





2*89-131.

STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO





...el Pollando

30-jara pensiulo interesigas pri sporto, literaturo kaj filatelo, kolektas postmarkojn kaj prospektojn, volas interŝanĝi postmarkojn: Wojciech Bera, Duchowo 24, 56-300 Milioz, woj. Wrocław, Pollando.

37-jara soforo, filatelisto, esperantisto volas korespondi: Stanisław Renn, str. Piaskowa 21, PL-62-100 Wągrowiec, Poll.

30-jara unuopa terkulturistino, neprofesia fotografo, amas bestojn kaj naturon, satas aŭskulti muzikon, legi librojn, volas korespondi kaj deziras trovi amikojn kaj ekkoni ilian vivon ĉiutage: Małgorzata Długaszek, Swoboda 3, 05-332 Siennica, woj. siedleckie, Poll.

26-jara laboristo interesigas pri turismo, literaturo kaj fotografio: Tadeusz Dudziak, Lewice 30 B, 48-144 Włodzianin, woj. Opole, Pollando.

21-jara polino volas korespondi kaj havas jenajn hobiajn: muzikon (precipe Beethoven kaj lia V-a simfonio, si satas ankaŭ Kylie Minogue kaj George Michael), kantadon, dancadon kaj vojagojn, si interesigas pri turismo kaj lingvoj - Esperanto, germana, angla. Dorota Palt, ul. Opolska 21a, 46-024 Lubniany, woj. Opole, Pollando.

27-jara virino interesigas pri literaturo, turismo kaj filatelo, kolektas bildkartojn kaj postmarkojn: Iwona Broniewska PCK 9 m. 7, 40-057 Katowice, Pollando.

Korespondi volas 24-jara fraŭlino Danuta Skwarło, Sądkowa 41, 38-204 Tarnowiec, woj. Krosno, Pollando.

24-jara fraŭlino volas korespondi: Elżbieta Wójcik, Wrocanka 6, 38-204 Tarnowiec, woj. Krosno, Pollando.

33-jara fraŭlino, kiu finis Universitaton en Varsovio, volas korespondi kaj interesigas pri turismo, literaturo, perbiciklaj ekskursoj, homoj, jogo, herbario, fremdaj lingvoj kaj aliaj temoj: Teresa Wrodycka, ul. Wodna 18 m. 1, 26-600 Radom, Pollando.

Koresp. deziras Małgorzata Mateusiak, ul. Szarych Szeregów 3m4, 56-500 Syców, woj. Kalisz, Pollando.

30-jara instruistino, fraŭlino volas korespondi: Katarzyna Kaszewiak, 05-660 Warka, skr.pocz. 32, Pollando.

40-jara fraŭlo volas korespondi: Stanisław Mironiuk, 21-040 Świdnik, str. M. Kopernika 13/37, Pollando.

30-jara fraŭlino interesigas pri geografio, literaturo, pentroarto, si satas vojagi: Maria Popiela, Sulejów, 07-160 Jadów, Pollando.

20-jara knabo interesigas pri turismo, sporto, bonaj romanoj, kolektas postmarkojn: Grzegorz Ossowski, Gawroniec 35/4, PL-78-326 Toporzyk, Pollando.

17-jara knabo interesigas pri diskomuziko, sporto, orientaj militoj, satas bestojn kaj longajn vagadojn kun dorsosako, volas korespondi kun celaj amikoj polingve: Andrzej Bednarski, ul. Chopina 12/7, 42-480 Poręba, woj. katowickie, Pollando.

S-ano H. Kořínková kaj ges-anoj Novobilský
sincere dankas pro multaj individuaj kaj kolektivaj
kondolenc-esprimoj ricevitaĵ okaze de la forpaso
de s-ano Jiří Kořínek.

Al Jiří Kořínek, nia Esperanto-poeto, estis atribuita honora titolo "merita kultur-laboranto". La 20-an de oktobro 1988 li estis ricevonta la honorigon el la manoj de ministro de kulturo de Ĉeĥa Socialisma Respubliko en la Kavalira salonego de la Valdštejn-palaco en Prago. La malŝanigo, kiu malebligis al li persone ĉeesti la solenan ceremonion, okazis, ke la 4-an de novembro 1988 la vivo de Jiří Kořínek fermigis. Li forlasis nin en aĝo de 82 jaroj. La lasta adiaŭo kun li okazis la 11-an de novembro en la solena salonego de la kremaciejo de Ústí n. L.

Ni rememorigu al ni koncize la vivon kaj verkon de Jiří Kořínek. Lia verkaro estis aprezita per vico de homorigoj, inkluzive de tiu lasta, pro kiu goji estis al li destinite nur dum kelkaj tagoj.

Jiří Kořínek naskigis en la jaro 1906 en Liberec. Lia patro ne revenis el la unua mondmilito, kaj tial la tuta pezo de materia sekurigo kaj edukado de du infanoj restis sur la patrino. Malgraŭ ĉiuj mankoj kaj zorgoj la patrino kapablis enspiri al Jiří kaj al lia pli juna fratino amon al la patrujo por la tuta vivo. Kiam monrimedoj ne sufiĉis, Jiří devis interrompi mezlernejan studadon kaj komenci labori kiel komerca komizo. Ekde la jaro 1931 li laboris en tekstila grandkomercejo en Brno. Dum la dua mondmilito li estis kiel honesta patrioto maldungita kaj devige laborigita en fandejo. Post la milito li revenis al sia origina profesio, en la jaro 1964 li translogigis al Ústí n. L., kie li laboris sia pensiuligo kiel kontrolisto de kvalito en la entrepreno Textil Liberec.

En la jaro 1922 kiel studento li konatigis kun la internacia lingvo Esperanto. La juna Jiří baldaŭ ekposedis la lingvon, pere de gi li eklogis internaciajn rilatojn kaj komencis konatigi kun kulturoj de ĉi tre foraj nacioj. Li ekhavis ideon helpe de Esperanto disvastigi la ĉeĥan kulturon malproksimen trans la limojn de la patrujo. Al lia naturo la plej proksima farigis tradukado de la ĉeĥa poezio en la internacian lingvon. Ekde la jaro 1949 gis siaj lastaj tagoj li dediĉis milojn da horoj al la pacienca laboro de tradukanto, sen ia ajn pretendo pri materia rekompenco aŭ honorario. La sola rekompenco por li estis la gojo pro la publikigitaj tradukoj de ĉeĥaj poetoj en eksterlandaj literaturaĵoj, ekz. en Francio, Svedio, Nederlando, Jugoslavio, Hispanio, Brazilo, Japanio kaj alilande. La nomo de Jiří Kořínek iom post iom farigis nocio en la mondo de la Esperanta literaturo.

Precipe liaj majstraj tradukoj de la poezio de Jaroslav Seifert, la posta Nobel-premiito pro literaturo, renkontis varmajn reeĥojn de eksterlandaj legantoj; estis poemaro Panjo, kiu aperis en Jugoslavio en la ja-

ro 1960, Kronplekto de sonetoj publikigita en Svedio, memstara numero de la literatura revuo Fonto dedicitita al J. Seifert kaj multaj dekoj da unuopaj poemoj de Seifert, kiuj aperis en diversaj eksterlandaj revuoj.

Kunlabore kun D-ro T. Pumpr kaj R. Hromada aperis lia traduko de Sileziaj kantoj de Bezruč. El ili iuj estis tradukitaj el Esperanto en aliajn lingvojn, ekz. en la maltan. En Brazilo aperis en la jaro 1985 la traduko de poemlibro "Flugilhava ŝtono" de J. Karen fare de J. Kořínek kaj en 1986 lia lasta libro, la traduko de poemaro "Sur sojlo de la amo" de M. Procházková denove en la eldonejo Fonto en la brazila Chapecó.

Pasintjare aperigis ĈEA en Prago monografion "J. Kořínek - elekto de originalaj kaj tradukitaj poemoj", kiu estas daŭrigo de antologio eldonita en Prago en 1976.

J. Kořínek kunlaboris ankaŭ super la reprezenta libro "Slovaka antologio", kiun en du eldonoj aperigis la Slovaka pedagogia eldonejo en Bratislava. La libro en la Esperanta traduko proksimigas al eksterlandaj legantoj specimenojn de poezio kaj prozo de la slovaka nacio ekde la plej malnovaj tempoj ĝis la nuntempo.

Rimarkinda estas la amplekso de tradukoj de muzik-tekstoj de J. Kořínek. Krom la kompleta traduko de Jakobeno de Dvořák kaj de Bibliaj kantoj de Dvořák ekzistas kelkaj centoj de liaj tradukoj de operarioj, klasikaj kaj popolaj kantoj kaj ankaŭ de modernaj kanzonoj. En la pasintjara Universala Kongreso en Roterdamo, same kiel en la UK en Londono, Varno kaj Beogrado, la membro de ŝtata operejo Zdeněk Nejedlý en Ústí n. L. g-ano M. Šmyčka prezentis en la kadro de internacia koncerto verkojn de ĉeĥaj majstroj en Esperanto.

Grava parto de la verkaro de J. Kořínek estas originala poezio en Esperanto. Krom la refleksa liriko ĝi enhavas emocie fortajn poemojn kun kontraŭmilita temaro, ofte publikigatajn precipe en la internacia revuo Paco. Plua temo, sonanta en liaj versoj precipe en la lasta periodo, estas ekologio kun insista alvoko al la nuntempa homo por sirmo kaj konservado de la sana vivmedio por feliĉa evoluo de pluaĵ generacioj.

Per ĉiuj siaj verkoj Jiří Kořínek senlace klopodis konstrui kultur-pontojn inter la amata patrujo kaj la eksterlandaj legantoj dissemitej tra la tuta mondo. Tiu ĉi laboro estis laŭmerite aprezita ne nur de oficialaj institucioj, sed ankaŭ ekz. de naciaj artistoj J. Seifert, I. Ská-la k. a.

La vivovojo de la modesta, senlace laborema kaj honesta homo finiĝis. Dum la pieta ceremonio la reprezentanto de Ĉeĥa Esperanto-Asocio J. Mařík finis sian adiaŭan paroladon per jenaj vortoj: "Mi adiaŭas vin, kara amiko, en mia nomo, en la nomo de la ĉeestanta delegitaro de ĈEA, kies honora membro vi estis, en la nomo de ĉiuj, kiuj estimas vin kaj vian verkaron, ĉu ili estas ĉi tie aŭ en foraj landoj, kie ili ankoraŭ ne scias, ke via vivo finiĝis. Por ni ĉiuj mi sincere dankas al vi pro via amikeco, pro via verkaro kaj pro ĉio envere homa, al kio vi donis al ni ekzemplon."

JIRÍ KOŘÍNEK AL NI

Ni konstatas - kaj memoru -, ke la lingvo vivas kaj evoluas kaj progresas en sia literaturo, kiu estas ĝia trezorejo kaj pulsanta arterio. Ĉiu kiu volas la lingvon perfekte regi devas legi. Legi kaj paroli! Nur poste verki. Legi ne nur gazetojn, sed ankaŭ librojn, prozon kaj poezion. Nur kiam ni tralegis dekojn da bonaj libroj, ni plene penetras en la spiriton de nia lingvo. Ĉar ellerni ĝisfunde kaj perfekte la satatan lingvon postulas sindediĉon, laboron, malpigron. Tio tamen estas multe pli valora kaj grava ol la nura varbado por la lingvo, kiam oni mem restas daŭre nekonvinkanta balbutanta komencanto! Ni konsciu, ke Esperanto malgraŭ sia relativa reguleco, simpleco kaj logikeco ne estas tiel facila, kiel oni propagande asertas. Troveblas en gazetartikoloj eĉ de famaj aŭtoroj aŭ estroj de gravaj Esperanto-organizoj gramatikaj eraroj. Plej ofte oni pekas kontraŭ la transitivecon de verboj, aŭ pri la kazo post la nereкта atribua predikativo enkondukita per "kiel" (cu rilatiga al la subjekto aŭ frazobjekto). Kvankam en Esperanto ni ne bezonas memori la genron de la substantivoj, ni devas memori la transitivecon de la verboj kaj memori la gramatikan karakteron de la vortradikoj, ĉar de tio dependas la korekta vortfarado kaj ekzakta sinesprimo. Kiom da lingvouzantoj legis aŭ pli guste studis la capitrojn pri la vortfarado en la Plena Gramatiko? Kiu povas konsulti fidindan vortaron, ekz. PIV? Kiom ofte ni legas en niaj gazetoj ekzemple "mi cesis la laboron, la domo estas situita sur altaĵo, gojas min, ke mi vin renkontas, mi haltis la aŭton" k.s. Kaj kiom da vortoj mankas al ni, se ni volas iom flue ekrakonti, babili? Sed ni ne tro miru, ke el cent homoj konsiderantaj sin esperantistoj eble dek regas la lingvon kontentige - se ni komparas kiom da tempo oni dediĉis al la ellerno de tiu la propagande facilega lingvo. La gepatran lingvon ni lernas ekde la bebago en la ĉiutaga senfina uzado per la aŭdo en nia ĉirkaŭaĵo, parole, lude, en infangardenoj, poste lege, en la bazlernejo, dum horoj de la lingvoinstruado, en mezlernejoj, en altlernejoj, ce la instruo de aliaj lernobjektoj, spertas la lingvon 15 horojn ĉiutage parole, aŭde, lege, en la radio, la televido, en la kino, la teatro ktp. Tio sumas miloble pli da tempo ol ni dediĉas kutime al la "facilega Esperanto". Kaj eĉ tiam oni iam eraras en sia gepatra!

Jes, estas malfacile, devigi iun al diligenta studado de lingvo, kiam la utilvida instiganto objektas, ke tiu lingvo ne prezentas al li adekvatan praktikan rekompencan, kiel ekzemple la ellerno de granda nacia lingvo, kiel la angla, kun ricega ciuspeca faka literaturo, ellaboritaj terminaroj, uzeblo en ĉiuj internaciaj konferencoj, kongresoj kaj renkontigoj k.s. Jes, ankoraŭ ni faras pioniran, kvazaŭ hobian laboron, kaj ni ne darfis ce la varbado blufi per neplenumebaj promesoj kaj troigoj pri la uzebleco de la lingvo. Ĝi povas kelkion, eĉ ne malmulte, al ni jam nun doni. Mi emus diri "senton de sincera amikeco", nun tiom bezonan en la hodiaŭa mondo. (El "Serta Gratulatoria in honorem Juan Régulo")

el letero de kei kurisu



S-ano Jaroslav Mařík ricevis pasintjare ampleksan leteron de la japana esperantisto Kei Kurisu, amiko de nia lando. El la letero, kiun s-ano Mařík disponigis al la redakcio, ni elpremas fragmentojn, kiuj povus interesi niajn legantojn.

Ankaŭ mi relative bone fartas kaj kvankam mi nun ne tre vigle laboras en la Esperanto-movado, tamen mi kredas, ke mi kontribuas al ĝi ĉefe per verkado kaj tradukado. Ĉar mi ofte mencias Esperanton en miaj artikoloj japanlingvaj kaj ankaŭ tradukas el Esperanto. Lastatempe mi tradukis kun mia filo (doktoro de medicino, hirurgo) la libron de Tibor Sekel "Tempesto super Akonkagvo". Krom tio guste nun mi pretigas novan japanan version de la "Fundamento de Esperanto" ankaŭ kun helpo de mia filo.

Ekzempleron de la libro "Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio", kiun vi proponas sendi al mi, mi jam havas. Ĝin sendis al mi sistempe s-ro Josef Vondroušek el Brno (ĉu li bone fartas?). Ĝi tre helpas min por pli bone koni la Esp.-movadon en via lando kaj per tio ankaŭ vian landon mem. Antaŭ nelonge Ulrich Lins, kiu estas mia bona amiko (mi ĉe tradukis japanlingven lian verkon "La danĝera lingvo"), bonvolis sendi al mi kelkajn n-rojn de "Starto", kiuj versajne estas superfluaĵoj ĉe li, ĉar mi skribis al li, ke de kelka tempo oni cesis sendi ĝin al mi el Praha. Mi ne scias, kial. Ankaŭ regula legado de "Starto" estas tre utila al mi ne nur por pli bone koni vialandan Esperanto-movadon, sed ankaŭ vian landon mem.

Eble vi scias, ke la eldonigo de "Raporto skribita en la pendumila maso" ebligis per tio, ke mi sendis al Ĉeĥa Esperanto-Asocio la tutan fotokopion de "Raporto desur la esafodo", sistempe esperantigita de ankaŭ bedaŭrata s-ano Rudolf Hromada, lau ĝia peto pere de s-ro Oldřich Knichal. En 1957 s-ro Ginz bonvolis prunte sendi al mi prespretajn presprovaĵojn de la Esp-a traduko de Hrogada, kiu ne povis eldoniĝi en 1951. Mi ilin mankopiis (ĉar tiutempe ankoraŭ ne trovigis elektronika kopimasino) en du grandformatajn kajerojn, kaj tuj resendis ilin registrite al li, kiu jam loĝis en Israelo. Mi montris tiujn kajerojn al s-ro Knichal, kiam en 1970 li vizitis min kaj tranoktis ĉe mi okaze de la Universala Ekspozicio en Osaka. Lau mia memoro s-ro Ginz volis sendi ankaŭ tiujn presprovaĵojn de "Raporto..." kune kun aliaj materialoj pri la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio al s-ro Novobilský. Sed eble li mortis antaŭ ol li tion faris. (Faris!, noto de Mařík.)

Ĉeĥa Esperanto-Asocio sendis al mi, versajne por min rekompenci, la brajlan eldonon de "Reportaĵ pri la opratec" eldonita en 1952, kiu estas laŭvice la 18-a ĉeĥa eldono de tiu ĉi mondfama verko. Ĝis nun mi ne scias, kial ĈEA sendis al mi guste tiun ĉi brajlan eldonon. Mi simple supozas, ke ĝi informigis pere de s-ro Knichal, ke mi kolektas ĉiujn ĉeĥajn eldonojn de "Reportaĵ...". Efektive mi ĝis nun sukcesis kolekti, multe helpate de vialandaj samideanoj, ĉiujn ĉeĥajn eldonojn ĝis la 33-a eldono en 1980 (ĉe Ĉeĥoslovenský spisovatel) krom la 8-a en 1949 (ĉe Naše vojsko). Sed ĈEA forĝesis donace sendi al mi rekompence ĉe unu ekzempleron de "Raporto...", kiu eldoniĝis en 1979 surbaze de "Raporto..." de Hromada sub la komuna prizorgo de du samideanoj Novobilský kaj Knichal. Nur post kiam mi plendis pri tio al s-ro Knichal, ĝi sendis al mi du ekzemplerojn.

Mia reviziita kaj kompletigita, preskaŭ tute nova japanlingva traduko de "Reportaĵ..." provizita per detalaj komentaĵoj, eldoniĝis en 1977 ĉe prestiĝa eldonejo Iwanami en Tokio. Ĝi enhavis ankaŭ portreton-foton de la aŭtoro, la fragmenton "O povaze české literatury", kiun li verkis same en Pankrác, ĉiujn liajn elmalliberejaĵn



Vespero en la EK
Tokio. Meze kun
okulvitroj staras
Kei Kurisu, apud
li - kun Hromada-
-vortareto - s-ino
Libertová el Bran-
dýs m.L., nun lo-
ganta en Japanio.

leterojn kaj kronologion de la vivo de Julius Fučík, kaj en mia postparolo mi danke menciis ankaŭ diverslandajn esperantistojn, ne nur ĉeĥajn, kiuj helpis min por kolekti la ĉeĥajn kaj alilingvajn eldonojn de "Reportaĵ...". En la lasta jaro aperis la 5-a eldono de mia japanlingva traduko de "Reportaĵ...", same kiel la 4-a eldono de mia japanlingva traduko de "Válka s mlody" de Karel Čapek ĉe la sama eldonejo. Post kelkaj tagoj aperos la 6-a eldono de mia japanlingva traduko de "Babička" de Božena Němcová same ĉe la eldonejo Iwanami. Ĝi unuafoje eldoniĝis en 1971. Pli frue en 1956 aperis ĉe la sama eldonejo mia japanlingva, iom mallongigita traduko de "Babička" por geknaboj. Tiukaze vialanda Ministerio de Informado kaj Kulturo bonvolis sendi al mi, versajne instiĝite de s-ro Ginz, la Esp-an tradukon (Avineto) por helpi mian traduklaboron. Mi tamen tradukis tiun ĉeĥan klasikan romanon rekte el la ĉeĥa originalo malgraŭ tio, ke ĉe tio min multe helpis la Esp-a traduko (iomete ankaŭ la ruslingva traduko, kiun same sendis al mi la Ministerio), kaj tiun fakton mi menciis en mia postparolo. Sed bedaŭrinde okazis, ke iu ĉeĥa samideano aŭ samideanino, sendis artikolon al la redakcio de "Literární noviny" pri tio, ke mi tradukis japanlingven la romanon de Božena Němcová laŭ la Esp-a traduko, certe por propagandi Esperanton tiamaniere. Tio ne konformiĝis al la fakto. La artikoleto aperis en LN. Eble ĝi helpis almenaŭ iom propagandi Esp-on en via lando. Sed aliflanke ĝi malhelpis min, ĉar iu japano, tiam loginta en Praĥo, disvastigis famaĉon ne nur en Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ en Japanujo, ke mi ankoraŭ ne scipovas ĉeĥe kaj tradukas ĉeĥajn literaturajn verkojn nur laŭ Esp-a aŭ alilingva traduko. Eĉ nun mi devas batali kontraŭ tia antaŭjuĝo.

Oni ne devas propagandi Esperanton surbaze de malvero. Tiurilate mi alte taksas vian sintenon rilate Interhelpon, ke tiu ĝi kummetita vorto devenis ne el Esperanto, sed el Ido. Ankaŭ mi tiel opinias post studo (viaj tiurilataj leteroj al s-ro Ginz helpis min ĉe tio) kaj en mia postparolo al mia japanlingva traduko en 1977 mi menciis ankaŭ Interhelpon kaj klarigante ĝin mi skribis, ke ekzemple laŭ la libro "V znamení proletárskeho internacionizmu" de János Szamuel Szabo (Bratislava, 1958) ĝi estas Esperanto-devena, sed laŭ la libro de Mojimir Grygar "Žil jsem pro radost" (Mládí fronta, 1958) pri la vivo de Julius Fučík ĝi estas Ido-devena, sed ke ĝi pli-versajne estas Ido-devena, ĉar Rudolf Mareček, ĉeĥo kaj unu el la fondintoj de Interhelpe, estis idisto.

Ankaŭ mia japanlingva traduko de "Osudy dobrého vojáka Švejka" eldoniĝis er kvar volumoj kun ilustraĵoj de Josef Lada de Iwanami en 1974. Ĝi estas nun elĉerpita, sed espereble ankaŭ ĝi reeldonigos post nelonge. Ĉiuj supre menciitaj miaj japanlingvaj tradukoj aperis ĉe Iwanami kiel volumoj de Iwanami-Biblioteko, kiu estas malmultekosta libretaro el bonkvalitaj kaj bone konataj klasikaj verkoj japanaj kaj alilandaj, kiun oni komencis eldonadi en 1927, laŭ modelo de la germana Universal-Bibliotek de Heclam. En la lasta jaro la eldonejo Iwanami aranĝis pompan bankedon en Tokio por festi samtempe la 60-jaran jubileon de Iwanami-Biblioteko kaj la 50-jaran jubileon de Iwanami-Libretaro, kiu estas serio el popular-sciencaj (ne nur naturraj sed ankaŭ sociaj) librotoj. Ankaŭ mi estis invitita al ĝi kiel kontribuinto, ĉar ne nur al Iwanami-Biblioteko sed ankaŭ al Iwanami-Libretaro mi kontribuis (en 1975 aperis en ĝi mia japanlingva traduko de "La danĝera lingvo" de Ulrich Lins).

Kaj nun... mi tradukas por alia eldonejo "Matka" de Karel Čapek. Ĝi eble aperos en unu volumo kun liaj du aliaj teatraĵoj "R.U.R." kaj "Bílá nemoc", kiujn mi jam pli frue tradukis japanlingven. De tempo al tempo mi renkontiĝas kun esprimoj aŭ aferoj malfacile kompreneblaj. Por ke mi povu prezenti al la japana legantaro ĉiurilate perfektan tradukon, mi satus demandi pri ili iun ĉeĥan samideanon. Ĉu vi mem povus helpi min ankaŭ tiurilate?

Mi studas ankaŭ duvoluman verkegon titolitan "Žaluji" eldonitan de Orbis en 1946. Ĉu vi konas ĝin? Ĝi konsistas el la taglibro de la kompilinto, kiu sin kisas sub la pseudonimo R. Karel, kaj kasleteroj de mortkondamnitaj en Pankrác dum la germana okupacio, kiujn li peris. Li konatiĝis kun ili ĉe fotografado antaŭ la ekzekutigo. Versajne li mem estis politika malliberulo kaj kion mi juĝas ... kiel tia li laboris tie kiel ia elektra teknikisto. Li ankaŭ helpis ĉe fotografado de la mortkondamnitaj. Mi hazarde trovis tiun duvoluman verkegon dum mia restado en Praha, iam en 1960, en unu el la vendejoj de malnovaj libroj, kaj aĉetis ĝin. En la lasta jaro mi relegis ĝin kaj estis ankoraŭfoje kortuŝita. Pro tio mi ekŝulis traduki se eble la tutan verkon japanlingven, se ne almenaŭ ĉefajn partojn el ĝi. Por tion fari mi komencis studi ankaŭ la historion de la kontraŭgermana rezistado en via lando ekde 1938 ĝis 1945, ĉar mi eksentis neceson al doni al mia japanlingva traduko de "Žaluji" iom detalan historion de tiu rezistado.

Fine iom pri mia familia vivo. Mi nun vivas nur kun mia edzino. Nia solfilo, kiu nun estas jam 45-jara jam delonge sendependiĝis kaj vivas kun sia familio: la edzino, ankaŭ kuracistino, kaj du filetoj aparte ne tre malproksime de ni. La 5-an de januaro 1983 li forflugis al Novjorko por unujara studrestado. Lia familio forflugis tien jam la 23-an de decembro.

Mia letero fariĝis jam sufiĉe longa, eble tro longa. Mi do finas kun koraj salutoj al vi kaj pere de vi ankaŭ al aliaj samideanoj en Praha. Espereble kelkaj el ili ankoraŭ memoras min. Sincere via
Kurusu Kei (Tokio)

Kurusu estas mia familinomo.

ANONCO POR E-BELARTISTOJ

Estimataj amikoj,
estas fondata faka sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio por pentristoj, skulptistoj, artgrafikistoj, artdesegnistoj, artfotografistoj, artmanlaboristoj, event. arĥitektoj por celo, efiki en internacia artasocio "UALE" (UNIVERSALA ARTISTA LIGO ESPERANTISTA) fondita kaj aligita en UEA Rotterdam ekde 1978. "UALE" havas sidejon en Finnlando kaj ĝis nun al ĝi prezidantis finnlanda arĥitekto, pentristo kaj grafikisto Aulo Minelli. Nia artekcio (laŭ nova statuto de ĈEA) devas nombri minimume 10 membrojn por esti aprobata. Vi, kiuj interesiĝas pri aktiveco en tiu ĉi sekcio kaj UALE, tuj turnu vin al portempa peranto - pentristo kaj skulptisto J. ČELIKOVSKÝ, Nemocniční 31, 352 01 AŠ kaj samtempe indiku Viajn eblecojn, spertojn kaj fakmaturecon.

FERVOJISTA SEKCIO

Vizito en Aŭstrio

Niaj sudaj najbaroj, anoj de Aŭstria Federacio Esperantista Fervoĵista /AFEF/ laŭstatute regule aranĝas siajn konferencojn. La lasta konferenco AFEF okazis en la tagoj 15-an ĝis 17-an de aprilo 1988 en Vieno kaj oni invitis por partopreno ankaŭ reprezentantojn de la najbaraj fervoĵistaj sekcioj el Ĉeĥoslovakio, FR Germanujo, Hungario, Jugoslavio kaj Italio.

Kiel eksterlanda gasto mi jam dum alveturo per rapidtrajno al Vieno estis atendata de unu el la gastigantoj, la aŭstria kolego kaj amiko Martin Stuppniĝ. Post logigo en la proksima porfervoĵista tranoktadejo apud fervoja stacio Wien Ostbahn kaj mallonga ripozo mi akceptis la afablan inviton interkonatigi kun aŭstria ĉefurbo.

Eluzante la belan, varman printempan veteron ni kun nia aŭstria kolego traveturis la urbon kaj vizitis multajn ĝiajn vidindaĵojn.

Unue ni en la urbocentro vizitis Hofburg, iaman imperiestran kastelon, grandegan konstruaĵon, en kiu troviĝas diversaj kolektoj, krom alia ankaŭ Esperanto-Muzeo, kiun ni kompreneble vizitis kaj iomete interkonatigis kun ĝiaj multaj ekspoziciaĵoj. Nia ĉiĉerono poste gvidis nin al Albertina palaco, konstruita en 1781 kaj enhavanta la mond-faman kolekton de grafikajĵoj. Poste ni iris al Ŝtata Operejo, dum la dua mondmilito ege detruita, sed de 1955 post rekonstruado denove malfermita en sia beleco. Tra Karintia strato /Kärtner Strasse/ - la plej riĉa kaj luksa strato en Vieno - ni daŭrigis la vojon al Stephanplatz, kie ni vizitis Stefan-katedralon, en kies nefinkonstruita norda turo pendas la Pummerin, plej granda sonorilego en Aŭstrio, pezas 21 000 kg.

Ankaŭ aliaj pli poste vizititaj lokoj, la Imperiestra Somerkastelo Schönbrunn, Belvedere, belega baroka kastelo de la princo Eugen kun botanika ĝardeno, Karlskirche, elstara baroka konstruaĵo kun kupolo 72 metrojn alta, Prater, amuzkvartalo kun la Giganta Rado kaj diversaj atrakciaĵoj, por kies iometa trarigardo oni bezonus multajn horojn, lasis en ni multajn impresojn kaj neforgeseblajn rememorojn.

La vesperan laboran parton de la konferenco inaŭguris AFEF-prezidanto, s-ro Walter Hube. Post salutado kaj bonvenigo de la partoprenantoj oni raportis pri sia agado dum lastaj du jaroj, inter aliaj pri la signifa kontribuo de AFEF por sukcesa solenado de la 150-jariĝo de la Aŭstria Fervoĵoj, pri laboro de la terminara komisiono, pri la faritaj fakprelegoj kaj ekspozicioj, informado pere de la propra Fervoĵista bulteno kaj aliaj aktivajĵoj AFEF.

Sabate antaŭtagmeze proksimume sesdek partoprenantoj de la konferenco vizitis la Fervoĵan Muzeon en Silberwald proksime de Vieno. En la muzeo sur areo 85 000 m² kaj sur 10 km da trakoj troviĝas

multaj valoraj objektoj - la vaporlokomotivoj, vagonoj, specialaj fervojaj maŝinoj, veturiloj kaj aliaj aranĝaĵoj. En alia domo vidalvide la Fervoja Muzeo ni poste vidis multnombrajn kolektojn de la modeloj de la fervojaj kaj nefervojaj veturiloj. Post komuna tagmango en la proksima stilrestoracio Martin Trapl ni helpe de la rapida fervojo Schnellbahn /validas por ĝi la fervojaj senpagaj biletoj "FIP"/ revenis al Vieno.

Tie ni komune iomete promenis sub gvido de esperantlingva ĉiĉerono por vidi aliajn vidindaĵojn de Vieno. Dum la promeno ni metis florkronon ĉe la Zamenhof-monumento sur la Börseplatz.

Por omaĝi memoron de la 71-a datreveno de la morto de L.L.Zamenhof - 14. 4. 1917 - estis dediĉita ankaŭ la solena kulturvespero en la Pola Instituto Vieno sub patronado de ĝia direktoro, magistro Andrzej Placzynski. En la programo estis solena koncerto el muzikverkoj de W.A.Mozart kaj Frederyk Chopin, recitado de Emil Vokal /parolisto de E-elsendoj de Radio Vieno/ honore al la Majstro, prelego de mag. Helga Farukuoye "La solvo de la lingva problemo en Afriko" kaj aliaj. La programo estis finita per La Espero, kiun sekvis malgranda regalo por ĉiuj partoprenantoj.

La lasta tago de la konferenco estis dediĉita al komuna veturo per la montara fervojo Semmering, vizito de la monumento kaj tunelo en Semmering.

Mi akceptis afablan inviton de miaj karintiaj geamikoj kaj veturis kun ili per eksprestaraĵo EuroCity Romulus al Vilach, centro de Karintio kaj la urbo, kie en 1975 okazis la 27-a IFEF-kongreso. Dank'al amika invito de mia amiko Martin Stuppniĝ mi poste vizitis ankaŭ Arnoldstein, la monaran urbeton kaj aŭstrian limstacion kun Italio, kie mi ne nur interkonatiĝis kun belega montara regiono de Villachaj Alpoj, interkonatiĝis kun vico de la aŭstria fervojistoj kaj ilia laboro, sed ankaŭ ĝrimpis al la pinto de Dreiländerecke, fame konata ne nur kiel kuntuŝo de la landlimoj de Aŭstrio, Jugoslavio kaj Italio, sed ankaŭ kiel limpurto de la tri grandaj eŭropaj lingvogrupoj kaj kulturoj slava, romana kaj germana.

Partopreno en la konferenco AFEF, bone preparita kaj organizata fare de niaj aŭstria kolegoj helpis al intersango de la spertoj, pliboniĝo de la kontaktoj kaj kunlaboro inter fervojistaj esperantistoj de la ambaŭ najbaraj landoj.

Jindřich Tomíšek

Klarigoj al la fotoj sur la apuda paĝo:

1. En la Fervoja Muzeo en Silberwald la partoprenantoj de la konferenco AFEF vidis multajn muzeajn lokomotivojn kaj aliajn eksponaĵojn
2. Dum promeno tra Vieno oni omaĝis kaj metis florkronon al monumento de nia Majstro L. L. Zamenhof okaze de la 71a datreveno de lia morto - 14. 4. 1917
3. Zamenhof-monumento sur Börseplatz (la distrikto de Vieno) estis inaugurita en 1958
4. Aŭstria elektra lokomotivo 1020 018-6 antaŭ ekveturo kun vartraĵo en landlima fervojstacio Arnoldstein

Honore al la 25-a datreveno de la fervoja prov-vojo de la Fervoja esplor-instituto inter la 4-a kaj 6-a de oktobro okazis en Pardubice internacia sciencteknika konferenco je la temo: La sciencteknika disvolvigo de la fervoja transporto. Kiel laborlingvoj de la konferenco estis la ĉeĥa/slovaka, rusa kaj germana lingvoj, kaj plus - eksperimente - ankaŭ Esperanto, por subteni la rezolucion de UNESKO pri Esperanto.

Krom dudeko da ĉeflingvaj prelegoj okazis 11 prelegoj alilingvaj, el kiuj unu rusa, kvin germanaj kaj kvin Esperantaj. La Esperantaj fakprelegojn prezentis J. O. de Kat el la Teknika universitato Delft, NL, István Gulyás el la generala direkcio de MÁV en Budapeŝto, H, József Halás el la Administracio de MÁV en Miskolc, H, Gvozden Sredič el la generala direkcio de JŽ Beograd, YU, kaj Lajos Sekereš el la Centro de la fervoja transporto de JŽ en Novi Sad, YU. La simultan interpretadon en kaj el Esperanto en la konferenca servo de Internacia organizaĵo de Journalistoj dum la tuta konferenco faris Ing. Ladislav Kovář.

La esperantistaj partoprenantoj de la konferenco (ankaŭ Heinz Hoffmann el Transporta altlernejo en Dresdeno, DDR, kiu prelegis germanlingve) renkontiĝis 5-an de oktobro vespere kun reprezentantoj de E-rondetoj en Pardubice. La renkontigon partoprenis ankaŭ la prezidanto de ĈEA Ing. Chrdle, CSc., kiu estis membro de la organiza komitato de la konferenco, la sekretario de ĈEA K. Franc (E-rondeto de Pacdefendantoj Dukla Pardubice) kaj la ĉefdelegito de UEA L. Rýznar (E-rondeto Tesla Pardubice).
(Laŭ Informace ĈES 5/1988)



1



3

2

4



ni recenzas

Miĥail Gorbacĥov: REALC KAJ GARANTIOJ DE LA SEKURA MONDO. Tradukis E. Sevĉenko kaj L. Novikova. Eldonejo APN, Moskvo, 1987. Form. 19,5 x 12 cm, 15 p. Prezo 10 kopekojn.

Ĉe komenco de la 42-a sesio de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝinta Naciaro en 1987 verkis la sovetia plej alta reprezentanto Miĥail Gorbacĥov artikolon, kies tekston povas esperantistoj trastudi en tiu ĉi broŝuro.

La intencoj de la plej altaj sovetiaj organoj pri sekurigo de paco kaj pri solvado de regionaj konfliktoj en la tuta mondo per pacaj traktadoj estas generale konataj. Ĉiuj, kiujn interesas internacia politiko, certe memoras la vortojn de Gorbacĥov, kiuj aperis en gazetaro. Tamen mi volas citi almenaŭ unu alineon sur p. 14: "Ni opinias, ke delonge necesas krei sub egido de UN universalan konsultan konsilion, unuigontan intelektan eliton de la mondo. Grandaj sciencistoj, politikaj kaj sociaj agantoj, reprezentantoj de internaciaj sociaj organizoj, agantoj de kulturo, literaturo kaj arto, inkluzive laureatojn de la Nobelaj kaj aliaj internaciaj mondgravaj premioj, elstaraj ekleziuloj povas grave pliricigi la spiritan kaj etikan potencialon de la nuntempa monda politiko." Tiuj ĉi vortoj rememorigas al mi la penson de nia Jan A. Komenský-Comenius, kiu skribis, ke sciencistoj devus regi la mondon.

Sed ankaŭ pri sekurigo de homaj rajtoj kaj pri ekologiaj problemoj parolas M. Gorbacĥov.

Koncerne la lingvaĵon, estas iom nekutima la verba uzado de la sufikso -end- en la senco "estas necese", "oni devas", ekz. sur p.4: "Sed ni opinias, ke ankaŭ 5 procentojn ne endas lasi" /t.e. ke 95 % de ĉiuj nukleaj armilaroj de Usono kaj USSR eblas likvidi./ Sur p.7 oni legas ankaŭ "endaj fortostreĉoj". Iam aperas iom nekutima stilo, ekz. sur p. 4: "La lasta kvarono de la 20-a jarcento estas markita per la revoluciaj laŭ sia enhavo kaj signifo ŝanĝoj" Oni preferas dirus: ".... estas markita per ŝanĝoj, revoluciaj laŭ sia enhavo kaj signifo" Sed generale oni povas gratuli la getradukintojn pro la bona lingva nivelo. Mi trovis nur unu preseraron sur p. 7.

La broŝuro estas bele presita sur bona papero kaj tre konvena, por esti sendata al samideanaro en la "okcidento", kie amaskomunikiloj /iam "ankaŭ-socialismaj"/ ne informas laŭvere civitanaron pri aferoj, okazantaj en la socialismaj landoj.

Bonveniga estas la fakto, ke oficiala sovetia agentejo APN eldonis tian publikvaĵon en Esperanto. Tio signifas, ke ĝi atribuas al nia lingvo gravan signifon. En neniu "okcidenta" lando io simila okazas.

Adolf Staŭra

Mihail Gorbačov: RENOVIGAN IDEOLOGION POR LA REVOLUCIA REKONSTRUO.

La parolo de la Ĝenerala Sekretario de CK KPSU en la Plenkunsido de CK KPSU la 18-an de februaro 1988. Tradukis E. Ŝevĉenko, L. Novikova, N. Ŝoroĥova. Eldonejo APN, Moskvo, 1988. Form. 19,5 x 12,5 cm, 48 paĝoj. Prezo 15 kopekojn.

La ĝenerala sekretario de la Centra Komitato de Komunista Partio de Sovet-Unio, Mihail Gorbačov, estas en la nuna tempo la plej aktiva mondformata ŝtatesto kaj politikisto, kiu en la mondan politikon penetrigis la klopodojn pri reduktado de danĝera atomraketa armado kaj liaj sukcesaj traktadoj kun la usona prezidento Ronald Reagan pravas tion.

Tial estas bonvene, ke esperantistoj povas konatiĝi kun liaj klopodoj en nia lingvo. La prezentata broŝuro enhavas ne nur liajn pensojn pri malaltigo de armado, sed ankaŭ pri aliaj internaciaj pli-malpli danĝeraj aferoj kaj pri interna ekonomia kaj politika statoj en Sovet-Unio. En socialismaj landoj liaj opinioj estas bone konataj, alia estas la afero en la cetera mondo. Kaj jen povas nia samideanaro konatigi siajn amikojn en aliaj landoj per tiu ĉi broŝuro.

En la parolado M. Gorbačov detale klarigas, kion ĉion oni devas ŝanĝi en la interna nuna al pli bona stato en Sovet-Unio. La ŝanĝoj estas gravaj kaj por multaj civitanoj ne sufiĉe facile kompreneblaj kaj akcepteblaj. Sed la radikala rekonstruo de la socio estas neevitinda. Pri tio oni povus citi multajn pensojn el lia parolado. Ekz. p. 13: "La socialismo eliris al la novaj historiaj limoj de renovigo. Do, renoviĝas ĉio. Kaj la praktiko, kaj la teorio." El liaj pluaj citindaj pensoj mi reskribas almenaŭ tiun, kiu estas aplikinda ne nur por interna bezono de multlingva Sovet-Unio, sed ankaŭ por la tuta mondo: "Vera internaciismo, vera amikeco de la popoloj estas eblaj nur ĉe profunda estimo al la digno, honoro, kulturo, lingvo kaj historio de ĉiu popolo, ĉe vasta komunikigo inter ili. Ni devas ciel kontribui al plua plivastigo de la kontaktoj inter la naciaj kulturoj, al ties reciproka pliriĉigo, al ties progreso kaj disfloro" /p. 22/. Ĉu tiuj vortoj ne estas inspiraj ankaŭ por ni, esperantistoj, precipe en la reciproka kontakto inter bonevoluintaj landoj kaj landoj postrestintaj?

La traduko estas tre bona, kvankam du specialaĵoj na estas sufiĉe kutimaj en Esperanto. Temas pri verbigo de la sufikso -end-, ekz. p. 4: "La rilaton al la instruisto endas /t.e. necesas aŭ oni devas/ ŝanĝi radike, rezolute, senprokraste kaj senhezite." Iam aperas vortordo nekutima, ekz. sur la sama paĝo: "Endas senŝanĝigi lin disde fremdaj por la instruista laboro devoj" Al mi ŝajnas pli nature ĉiri: ".... disde por la instruista laboro fremdaj devoj" aŭ: ".... disde devoj, fremdaj por la instruista laboro...."

Estas uzataj formoj "pasinto, estonto" en la senco "pasinteco, estonteco" /laŭ PIV/. Pri la unuaj formoj pledis Kalocsay, sed al mi ili ŝajnas netrafaj. Ofte oni trovas la prepozicion "far", kiun Akademio malakceptis. Anstataŭ "fariĝi" aperadas nura "iĝi". Preserojn mi ne trovis, sed sur p. 33 oni legas la vorton "krajoj". Strange, en la rusa same kiel en la ĉeĥa lingvoj ekzistas la vorto "kraj" en la senco "regiono" /sed ankaŭ "rando"/. Ĉi tie "regiono"

tute konvenus laŭ la konteksto. Tipe estas verbigitaj adjektivoj en la antaŭlasta alineo de la parolo: "Do, nin atendas granda streĉa laboro. Grandegas amplekso de novigaj ideoj kaj proponoj, kiuj aperas en la partio kaj la socio lastatempe. Grandas kaj konstante kreskas amaso de multnombraj konkretaj demandoj." Tre grava eldiro.

Adolf Staŭra

ni legis

El la vortoj de prof. H. Tonkin, prezidanto de UEA:

"... Ne estas facile labori por tiel postulema mastro kiel estas tiu nia komuna lingvo: necesas respondi leterojn, skribi leterojn, interveni ĉe instancoj, varbi homojn por kursoj, instrui ankoraŭfoje la korelativojn, redakti, kunsidi, multobligi, telefoni, glui, ekspedi, protesti, kunordigi, pacigi, registri, kalkuli, kvitanci, protokoli - temas pri tuta terminaro de organizado kaj administrado.

Sed tiuj verboj, tiuj operacioj, ne estas celoj, sed rimedoj; ne estas atingoj, sed operacioj. Disputi pri detaloj, trovi erarojn ekzistantajn aŭ neekzistantajn en protokoloj, krei ĵaluzon aŭ malpacigon inter la homoj, aŭ eĉ tiel kondukti, ke nur oni pravas, kaj neniel la aliaj - tiuj estas ofte la agoj de tiuj, kiuj perdis la gojojn de esperantisteco; de tiuj, kies koro ne plu saltas je la unua kantado de la Himno en kongresoj; de tiuj, kiuj ne plu sentas tiun koncetrigon de la intelektaj fortoj, kiam ili kun eksterstarantoj diskutas pri la meritoj de Esperanto. Tiuj estas la agoj de tiuj, kiuj perdis la grandajn celojn kaj faras celojn el la propra pravo, el la propra venko...

Trovu en ĉiu homo la bonan kaj ne insistu pri la malbono. Trovu tion, kio taŭgas; ne elstarigu tion, kio maltaŭgas. Kaj komune ni venkos la obstaklojn, kiuj staras antaŭ ni - ankaŭ la obstaklojn de ni mem levitajn..." (Esperanto n-ro 9/88)

Urbestro parolis Esperanton!

"Mi parolas Esperanton publike unuan fojon, kvankam mi lernas ĝin jam de 20 jaroj," diris urbestro Aaro Heikkilä en sia parolado kaj surprizis la publikon dum la Vintraj Tagoj de Esperanto-Asocio de Finnlando..." (La Espero n-ro 3-4/1988, Sveda EA)

Rimvortaro por poetoj

Aperis en Britio dum la jubilea jaro tute nova, okdek pagojn ampleksa "Esperanta Rimvortaro" de Jonathan Cooley. La verko estas fakte "elpensita, kompostita, enpagigita, fotografita, presita, bindita, eldonita, vendata kaj distribuata de la aŭtoro. La libro enhavas preskaŭ dudek mil vortojn (pli ol ses pagoj de -io-rimoj!), fakte eble pli ampleksa ol la rimvortaro en "Parnasa gvidlibro". (La Espero n-ro 5-6/1988)

Gaja interpretisto - sombra tradukisto

La vorto "tradukado" signifas, laŭ la difino de PIV, generale la taskon anstataŭigi vortojn kaj esprimojn en unu lingvo per samsencaj vortoj kaj esprimoj en alia, sendistinge, ku tio okazas parole aŭ skribe. Sed por signifi parolan aŭ busan tradukadon oni kutime uzas la vorton "interpretado", tiel limigante la sencon de "tradukado" al skriba laboro. Ĉi tiu senciferencigo versajne spegulas la ĉiam pli striktan disdividon de la tradukaj laboroj en la du suriĉe specialigitajn fakojn. Fakte ni scias, ke ne ĉiu (skriba) tradukisto estas same kompetenta en interpretado kaj inverse. Kelkaj diras, ke interpretado estas pli konvena laboro por ekstravertitoj kaj tradukado por introvertitoj! (Revuo Orienta n-ro 6/88)

Interferaj vortaroj

Lajos Korsós (Hungario) preparis la interferan vortaron inter pluraj lingvoj kaj Esperanto. (Interferaj vortoj estas tiuj, kiuj laŭforme kaj laŭhave samas en du lingvoj.) (Budapeŝta Informilo 9/88)

lingva angulo

Ĉu "hidraŭdinamiko" kaj "hidraŭle" sistemo?

Aĉetante la broŝureton de J. Rybář /1982/, malfide mi haltis jam ĉe la titolo: Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj. /La substreko estas mia; nome, mi ne komprenis, pro kio oni estis aplikinta la torsigon de la generale konata termino: hidraŭlika./

Ion trankviligis min la 2-a paĝo, kie mi povis legi, ke la terminar-ellaboron auspiciis la scienca-teĥnika sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio kaj ke konsulte partoprenis renomaj esperantistoj.

Ververe, la terminaro entute impresas kiel tre akurata kaj tre kompetente verkita. Tamen, mia origina malfido ankoraŭ kreskis, kiam sur p. 3 mi legis jenan ŝokaĵon: hidraŭ- prefikso signifanta hidraŭlan karakteron aŭ agmanjeron, dum la prefikso "hidro-" estas liberigita por ĥemio, kie ĝi signifas "hidrogeno en kombinaĵo". "Hidraŭ-" povas esti rigardata ankau kiel sinkopita adjektivo "hidraŭla" en koncernaj determinaj vort-konmetaĵoj. /Pro la substrekoj ree kulpas mi./

Nu, mi aŭdacas publike prezenti jenajn demandojn:

1. Ĉu vere oni volas sugesti al ni la tezon, ke en Esperanto, la radikera /ne prefiksa/ leksemo "hidro-" servos al la ĥemiaj terminologio kaj nomenklaturu por esprimi esklude "hidrogenon en kombinaĵo"? Hidrogeolo, hidrolizo, hidrosolo k.m.a. ja ne koncernas hidrogenon, sed akvon.
2. Kiamaniere "liberigi" la leksemon, kiu primare koncernas akvon, por sola ĥemio, se ĝi aperas en centoj da terminoj diversfakaj: hidrobetono, hidrocefalio, hidrocentralo, hidrogeologio hidrozoo?
3. Se "hidro-" nenial povas esti "liberigita" por la supra sekundara okazo, kial enkonduki la strangajn "hidraŭ-" por la sfero hidraŭlika, kiu intime koheras kun alifakaj? Kiu poste dekretu - surbaze de dubindaj kriterioj - ĉu en konkreta okazo apliki "hidro-", ĉu "hidraŭ-".
4. La sinkopo "hidraŭla" estas enigma volapukaĵo. Ja la tuta mondo uzas adjektive la terminon "hidraŭlika" /cs: hydraulický/ derivitan de la substantivo: hidraŭliko /cs: hydraulika/. Kiuĵ motivoj pravigas spiti al la generale establita uzado? Ĉu la sparo dulitera? Se nur tio, oni rajtus lanci analoge: fiza /astrofiza, geofiza, metafiza/, akusta, meĥana, opta, terma
5. Ĉu la substantivo: hidraŭliko ekzistu samrajte apud la sinkopita adjektivo "hidraŭla"? Se jes, nature levigos la demando, kion do signifas la substantivo "hidraŭlo"? Ĉu ni komprenu ĝin kiel sinonimon de hidraŭliko, cu temu pri nova nocio?

Resume: Ĉu Esperanto jam nuntempe, kiam ĝi pene batalas por oficiala agnosko en la sfero scienca-teĥnika, kiam ĝi serioze ambi-

cias kunlabori enkadre de internaciaj normigaj institucioj, reĵtas tiom draste, eĉ tiom arbitre intervenadi en bone establitan aŭ kodigitan terminaron?

Danke mi akceptos ajnan respondon al tiu ĉi principa demando, kiun elvokis nenio alia ol zorgo pri la scienca reputacio de la centjara Esperanto.

J.Kavka

Oni uzu fakajn terminojn, esprimojn kaj nomojn - sed nur fake!

Post verkaĉo de mia eseo "Kiel fake kontroli tekston" /Akademiasaj Studoj, 1986, pg. 88-90/, en kiu mi malfavore kritikis la lingvouzon en artikolo titolita "La pratemploj de Malto" /Monato, 10/1984, pg. 31-33/, alvenis reago de s-ro Carmel Mallia, la aŭtoro. Li konfesis, ke eraroj enŝteliĝis en lian verkon, sed li provis defendi sin, argumentante, ke li ne estas arkeologo, kaj lia intenco ne estis verki fakan artikolon sed nur informan eseeton. Sekve, li opiniis nejusta mian analizon de la enhavo de lia verko laŭ la normoj de fakaj verkoj. Jen kelkaj el la plej gravaj eraroj en la artikolo de s-ro Mallia.

1. Ĉalkolito. En neniuj lingvoj konata al mi aŭdiĝas "ĉ" - sono en la ekvivalentaj vortoj: A. chalcolithic. F. chalcolithique. G. Chalkolithikum komencigas per "k" - sono. La formo de la vorto en Esperanto devas esti "kalkolitiko".
2. paleontologio = "la scienco de fosiloj". Fosilo estas ilo por fosi, ekzemple sovelilo, ŝpato, pikilo, pioĉo, ks. Laŭ mia scio ne ekzistas aparta scienco pri tiu ilaro. La gusta vorto estas "fosilio".
3. relikvaĵoj de granda ŝtonidolo. Relikvo estas restaĵo de la korpo de sanktul/in/o aŭ aĵo apartenanta al tia vivinta persono, kiu konservigas en relikvujo en pregejo. En la kunteksto temas pri restaĵoj de granda ŝtonidolo.
4. bestoreliefoj ĉizelitaj sur ŝtonaj muroj. La vorto "ĉizelita" ne ekzistas en Esperanto. Okazis intermikso de du vortoj: /1/ "ĉizi", kiu estas la gusta termino, signifas tajli aŭ kavigi per ĉizilo malmolan materialon; /2/ "ĉizeli" estas tute alia tekniko, per kiu oni retuŝas aŭ finpretigas metalajn objektojn per ĉizililo.
5. radiokarba kronologio. Nu, tiu kronologia metodo baziĝas sur la analizo de la kvanto da radioaktiva karbono /C¹⁴/ - ne karbo! - troviganta en ĉiuj organikaj substanĉoj.

Ĉar mi sammaniere kritikis la riproĉindan lingvouzon de Renato Corsetti /Heroldo de Esperanto, 1985, 4-5 /1743-44/, pg. 7/, li efis la saman rekantaĵon: "mi ne celis verki arĥeologian artikolon, sed nur ĵurnalisman rakonton por aliaj simplanimaj esperantistoj kiel mi" /Heroldo de Esperanto, 1985, 9 /1748/, pg. 4/. S-ro Corsetti erare kaj nekonsekvence asimilis proprajn kaj gentajn nomojn apartenantajn al la kultura tradicio de la Okcidenta Civilizo. El la 18 lok- kaj gentnomoj, kiujn mi rikoltis, estas registritaj en Plena Ilustrita Vortaro /PIV/ 17!

Eraraj formoj de Corsetti

Dionisus
Eneas
Herodotus
Kikero
Remus
Romulus
Tarkuinjus
Pompei
Tiber
montaro Alpo
feniko
babilonano

Gustaj formoj laŭ PIV

Dionizio
Eneo
Herodoto
Cicerono /kikero estas legomo!/
Remo
Romulo
Tarkvinio
Pompejo
Tiberio
Alpa montaro
feniko
babiloniano

Mi ne samopiniis kun s-ro Mallia kaj Corsetti. En Esperanto, same kiel en ĉiuj etnolingvoj, ekzistas diversaj niveloj de lingvouzo, ekzemple la komunuza lingvo, la literatura lingvo, la slango, kaj ankaŭ la faka lingvo. Literaturaj vortoj kutime diferencas disde sinonimoj en la komunuza parto de la leksiko pro siaj apartaj nuancoj, kiujn beletristoj trovas utilaj, eĉ necesaj, por pli efika sinesprimado. La plej grava trajto de la faka lingvo estas la preciza signifo, kiun havas ĉiu termino en limigita kaj specifa kunteksto. La slango plej ofte trovigas en la efemera parola lingvo. Literatura vorto en kunteksto de la komunuza lingvo povas krei komikan efekton. Faka termino estas uzebla en nefaka kunteksto, sed ĝi ne perdas sian fakan esencon. Ĝi devas esti uzata fake, eĉ se la verko estas direktita al laikoj. La semantika enhavo de faka esprimo daŭre restas kun ĝi kiel la ombro de persono aŭ objekto. Sekve de tio, kiu uzas fakajn vortojn, ĉu en porinfana libro, ĉu en krucvort-enigmo, ĉu en doktora disertacio, devas informiĝi pri la preciza signifo kaj la gusta formo de la koncernaj terminoj. Neniu duaranga lingvouzo estas tolerebla! Plue, oni ne rajtas inventi siajn proprajn fakajn vortojn, se jam ekzistas akceptitaj terminoj /la sola escepto eble estas en la sciencfikcia genro/. Laŭ la vidpunkto de la nuntempa internacia arkeologia nomenklaturado, kelkaj el la terminoj troveblaj en la artikolo pri Malto estas evidente malgustaj en iu ajn kunteksto.

La samaj rigoraj lingvaj kaj fakaj kriterioj estas aplikeblaj ankaŭ al la formoj de propraj nomoj en la citita duparta artikolo de Corsetti, titolita "Niaj prapatrinaj: la etruskoj" /Heroldo de Esperanto, 12 /1735/, pg. 3 kaj 13 /1736/, pg. 3/. La plejmulto de tiuj nomoj havas ne nur la sankcion de Plena Ilustrita Vortaro sed ankaŭ de aliaj Esperantaj konsultverkoj kaj la uzado de laikoj kaj fakuloj. Per la enkonduko de deviaj formoj, Corsetti semas konfuzon kaj evidentiĝas sian nefakulecon sur la lingva tereno.

Mi ne verkis mian eseon kun la celo staki Monato, Heroldo aŭ la aŭtorojn de la cititaj artikoloj. Mia intenco estis averti la tutan esperantistaron, ke post cent jaroj, la nivelo de lingvouzo en Esperantujo ankoraŭ ne estas kontentiga. Mi trovis same subnorman lingvouzon ankaŭ en aliaj publikigaĵoj kaj atentigis pri tiu situacio. Bedaŭrinde, la redakcioj ofte preferas obstine fermi la okulojn kaj orelojn aŭ saĝnigi, ke la lingvouzo vere ne estas malgusta, ĉar temas pri stilaj apartaĵoj de aŭtoroj aŭ pri kompostera-



SOMERA ESPERANTO-TENDARO EN LANĈOV

La fotoj de Ing. Veselý proksimigas al ni vivon en la tendaro: la vesperan vicigon, la cefan konstruaĵon de la tendaro, la banadon en la lago (al Prof. Horský ĝi plaĉas), kaj la gajnintojn de la konkuro: MISS LANĈOV '88, SINDPATIULO LANĈOV '88 kaj MISTER LANĈOV '88.

roj, kiujn legantoj de presprovaĵoj preteratentis. Kiel mi provis demonstri ĉi-supre, same nedefendebila estas la preteksto de tiuj aŭtoroj, kiuj verkas laike pri fakaj temoj.

Bernard Golden

ŜTONIĜO DE LA LINGVO

"Al la esperantistaro, en kies manoj nepre restas la sorto de nia lingvo, la Akademio konsilas, ke ĝi uzu kun la plej granda modereco sian povon enkonduki kaj per uzo aprobi novajn vortojn. Estas ĉies devo, antaŭ ol uzi novan vorton, zorge konstati, ke ĝi ne estas superflua, alivorte, ke ĝi ne estas anstataŭebla per tauga vorto, ĉu fundamente, ĉu almenaŭ tre ĝenerale uzata."

Ĉu per tia konsilo, per konsiloj ankoraŭ pli severaj al la aŭtoroj de vortaroj kaj lernolibroj, la Akademio ŝtonigas nian vivantan lingvon?

Tute ne; sed ĝi tre bone scias, ke nia komuna lingvo devas pli riĉiĝi malrapide kaj kvazaŭ senrimarke.

Normala, senrompa povas esti la evoluado, nur se ĝi estas tute trankvila kaj natura.

Febreca agitado ne estas vivo, sed ofte la signo de komenciĝanta defalo.

Tro rapida kreskaĵo disigis, por tiel diri, la brancaron de la firma trunko kaj de ĝi radikoj. Dum kelka tempo tre bela, tre verda saĝnus eble la foliaro, sed baldaŭ ĝi velkus, sekigis, kaj kun ĝi mortus la tuta arbo.

Antaŭ ol enkonduki novan vorton ĉiu do demandu sin, ne nur, ĉu ĝi ŝajnas al li necese, sed kiamaniere oni tradukus en aliajn naciajn lingvojn la ideon, kiun li deziras esprimi. Plej ofte li konstatos, ke tiuj lingvoj alportas al li solvon, kiu tute ne necesigas la kreon de nova radiko.

Ekzemple: oni volas traduki la francan esprimon "un arbre adulte". Ĉu novan radikon oni bezonas por la adjektivo "adulte"? Ĉu la germana "ausgewachsen", la angla "full grown" ne montras al ni tute taŭgan dirmanieron: "elkreskinta, plenkreskinta /arbo/"? Ĉu tiuj ĉi lingvoj, la germana kaj la angla, ne estas sufiĉe precizaj, sufiĉe sciencaj? Ĉu Esperanto bezonas pli da precizeco, da scienco, ol ili? - Por kiom da novaj proponitaj radikoj oni povus fari saman rezonadon? - Oni ne forgesu aliparte, ke la riĉeco de la lingvo ne konsistas nur en la multnombreco de la vortoj, sed ofte kaj ĉefe en ilia elasteco.

Granda merito, granda supereco de Esperanto super ĉiuj artaj lingvoj ĝuste estas tia elasteco, dank' al kiu nia ĉiutaga lingvo farigis viva kaj natura.

Tiun elastecon ni konservu ĵaluze kaj ni zorge evitu rigidigi - vere ŝtonigi - la lingvon per tro severa, tro mallarĝa difino de ĉiu radiko. /L.I., Nov. 1912/.

Prof.Th.Cart

En tiu ĉi studaĵo pri la lingva evoluo kaj beletra praktiko citas s-ino Urbanová preskaŭ tutajn du pagojn de Kalocsay, sed tiu pledis por 140 neologismoj, kiuj fine - dank al lia longe vivo kaj aktiveco - estis akceptitaj. Tamen estas rimarkinde, ke Hromada en sia poŝvortaro registras ilin nur en la Esperanta-ĉefa parto, ne en la ĉefa-esperanta. Laŭ tio oni povas konkludi, ke li ne subtenis disvastigadon de tiuj vortoj. Vatré kolektis en sia Neologisma glosaro 2000 vortojn.

S-ano Karen skribas en Starto 5/87, p. 8: "J.Rumler aldonis el propra inventemo cirkaŭ 40 vortojn" /el Vatré li prenis cirkaŭ 300-400/. Pledi pri tia inventemo oni ne povas per vortoj de Kalocsay. Karen rekomendas: "Vortaristoj ne forgesu aĉeti tiun ĉi necesan aldonon al FIV." Sed en Literatura Foiro n-ro 109 aperis intervjuo kun G.Waringhien kaj li diris: "/Vatré/ ... donis al mi la ciferojn: estas apenaŭ ok procentoj de neologismoj, kiuj troviĝas dufoje en la dokumentoj, neniu pli ol dufoje, do 92 % nur unufoje!" Ĉu tial oni devas nepre imiti s-ron Vatré? Sur p. 6 diras Eli Urbanová: "... la Neologisma Glosaro de Vatré, eldonita ... /kunlabore kun la ĉefa aŭtoro de la PIV Waringhien/." Tiuj vortoj estas do evidente neveraj, ĉar la titolo de la citita intervjuo estas: "Waringhien: nek cedi nek koncedi al la -praga skolo-." Tial mi povas ĉi tie aldoni miajn vortojn, adresitajn al Rumler, ke li estas kiel movadano "nepre komencanto". Mi aldonas: Se mi, laŭ Rumler, estas "naŭva", li ne estas alia, ĉar li supozas, ke esperantistaro estos avida lerni liajn "pliriĉigaĵojn" de la lingvo, por povi legi liajn poemojn. Li refutis nenium mian argumenton, aperintan kontraŭ neologismemuloj en Starto 5/87. Li ne konatigis inter esperantistaro kiel fidela membro de nia komunumo. Kaj la eldiro de Karen pri aldone de 40 vortoj fare de Rumler kvazaŭ konfirmas la antaŭdiron de K.Čapek, kiun mi jam citis en Starto: "... en ĉiu nacio estis propagandata alia Universala Lingvo."

Sur p. 3 en la teksto de Eli Urbanová oni ankaŭ legas: "Sed kompreneble, ĉi tiun evoluon oni devas iel bridi." Laŭ tio mi agas. Sur la sama pago oni legas pri "skemistoj kaj senskrupulaj progresantoj". Tio havas nenium signifon por vicaj samideanoj, kiuj satas legi Esperantan poezion. Kiom da ili ekzistas en la mondo?

La libron Romeo, Julieta kaj la tenebro tradukis ne E.Váňa, sed Vladimír Váňa el Plzeň /p. 4/.

"... famaj ĉefaj nacilingvaj poetoj kreantaj ankaŭ en Esperanto, Jiří Karen kaj Josef Rumler ...", diras s-ino Urbanová sur la sama pago. Vane mi serĉis tiujn nomojn en Ilustrovaný encyklopedický slovník, aperinta en la j. 1980-82, kiam ambaŭ poetoj estis jam cirkaŭ 60-jaraj. Ankaŭ la verko de Petr Bílek "175 aŭtorj" el la j. 1982 ne konas tiujn nomojn. Meznivela detektivaĵo aperas en la ĉefa lingvo en 100 000 ekz., infanlibroj kun tekstoj de vere famaj ĉefaj aŭtoroj eĉ en 120 000 ekz., sed la poemaro de J.Karen Stromy priĉazejĵi do masta estis eldonita en 830 ekz. Ĉu tio atestas pri famo? Kaj en la magazino Kviz mi legis antaŭ nelonge, ke en la mondo estas cirkaŭ 10 milionoj da esperantistoj, do proksimume tiom, kiom da ĉefoj. "Abunde kaj redunde" aperis en 3 000 ekz.

La Akademianino uzas la vorton "preso" /p. 4. lin. -8/, ĝuste devas esti "gazetaro" aŭ "publikigaĵoj", kiel jam antaŭ jaroj kritikis Bernard Golden. Cetere, en la tuta teksto oni trovas - milde dirite - lingvajn neprecizigaĵojn /ekz. far, eluzi/. En la linio sub "preso" estas uzita la vorto "erst". Tio estas eble unusola neologismo en la tuta studaĵo. La Akademianino konscias /p. 5/: "... tio ne signifas, ke ni kiel aŭtoroj disipu per ili tiagrade, ke niajn kreaĵojn fine neniu komprenus." Prudentaj vortoj, sed aliaj neologismemuloj /Pič, Hauptenthal/ ne agas tiel. Pri tekstoj de tiuj du aŭtoroj, ankaŭ pri Diego kaj Vatré aperis en diversaj gazetoj mencioj, kiuj estis neniam aprobaĵ, konsentaĵ.

Fine, sur p. 9 Eli Urbanová mem pravas, ke eblas krei eĉ en la nuna tempo versojn sen unusola nova neologismo. Sed mi forte dubas, ke tiuj versoj povis efiki je simpozianoj en Varsovio simile, kiel la mamoj de Frina je juĝistoj.

Adolf Staŭra

RONDETA VIVO



NÁCHOD La klubo kunvenas regule ĉiun duan kaj kvaran vendredon en monato. Krome estas kurso por komencantoj kaj kurso por progresintoj - en ambaŭ instruas Fr. Močík, du pionir-rondetoj - en ambaŭ instruas K. Strouha, serio da prelegoj por la neesperanta publiko "Per Esperanto tra la vasta mondo" - gvidas M. Rönneforsová. Sabate la 17-an de septembro vizitis la klubon esperantistoj el Ĉeĥá Třebová kaj oni ĝuis amikan etoson, muzikon, poezion kaj sociatajn ludojn; precipe ŝatis ĉiuj popularan "mang-tonbolon". Venis esperantistoj ankaŭ el Trutnov, Jaroměř, Úpice kaj Žacléř.

STRÁŽNICE Per fondkunsido el la 30.11.1988, kiun ĉestis ankaŭ direktoro de SKP ROH "STRÁŽNICE" k-do Karel Vavříček, komencigis ekde la 1.12.1988 Esperanto-klubo de SKP ROH "STRÁŽNICE". Laŭ la decido de la fondkunveno prezidas la kluban komitaton s-ano Vladislav Hasala, A. Dvůrka 1, CS-696 62 Strážnice, tel.: 0631 942507. Pluaj membroj de la klubo komitato estas: s-ano Antonín Bednařík, Lány 17/1366, CS-698 01 Veselí nad Moravou, distr. Hodonín, tel.: 0631 2828 kaj s-ano Jiří Faňa, Kovářská 20, CS-696 62 Strážnice, tel.: ofica: 0631 942112 (ĉefo de la loka postoficejo). La oficiala adreso de la EK estas: ESPERANTO Klub SKP ROH "STRÁŽNICE", Veselská 1321, CS-696 62 Strážnice, Ĉeĥoslovakio (tel. 0631 942762).
-vlh-

TESLA-PARDUBICE La E-grupo kun siaj 37 membroj de ĈEA strebas en la unua vico kontentigi la interesojn de siaj membroj, akiri novajn kaj zorri pri la plialtigo de ilia lingvonivelo. Pro tio la membroj uzas la sblojn, kiujn prezentas nia movado, partopreni diversajn E-arangojn kun favoraj kotizoj. Dum la jaro 1988 ni vizitis arangojn kaj ili estis: "Ĉebalta Esperanto Printempo" en Mielno-Koszalin en Pollando, "IKEN - Maturanka Renkontigo" en Abaliget en Hungario, E-renkontigo en Potsdam - GDR. Sune partoprenis 13 niaj membroj kaj 7 membroj de la E-grupo en Polička, entute 20 membroj. Konsterniga fakto estis, ke la supre menciitajn arangojn partoprenis nur niaj membroj, krom ni neniu alia samlandano. Hungario estas por ni malferrita ĉiun duan jaron, Pollando estas vizitebla sen problemoj, se vi respektas la preskribojn. Nia membrino estis gasto de la pedagogia seminario en Francujo, poste ŝi partoprenis la 73-an UK en Roterdamo. Ĉion konvenan necesas utiligi por la propagando kaj pro tio ŝi jam sesfoje prelegis al esperantista kaj neesperantista publiko en kaj ekster Pardubice. Ni gvidas kursojn por komencantoj, progresintoj, konversacian grupon dum klub-vesperoj ankaŭ kun programoj, ĝis nun neregulaj. Ni gvidas kursojn por du diversaj infangrupoj, ankaŭ ili ĉiujare ekskuredas. Dum junio pasintjare ili estis en Altaĵ Tatroj gaste en Popraĵ, en la domo de SEA.

La 5-an de novembro 1988 ni aranĝis la III-an Esperanto Tagon en la klubejo de TESLA kun gastoj el Orienta Bohemio. La tradicion ni satas konservi kaj renkontigi denove dum novembro 1989. La lasta renkontigo allogis ankaŭ multajn neesperantistojn, ĉar ni envicigis en la programon psalcingvan prelegon de s-ano J. V. Otta el Ĉumperk pri psikotroniko.

Ankaŭ ĉiujaraj septembraj ekspozicioj pri Esperanto en la ejo antaŭ la teatra salonego de la klubo farigis parto de la jara laborplano.

Tiujn rezultojn ni povis atingi nur pro la favora sinteno de ZK ROH k.p. TESLA kaj bonaj kontaktoj kun ĝi. (L. Ryznar)

VYŠKOV La plej grava tasko por nia rondeto estis pligrandigo de nombro de membroj por antuta plilargigo de nia agado. Tial ni orientigis al informado pri Esperanto kaj propagando. Por tiu celo ni uzas nian keston sur la placo de 1-a majo, pri kies instaligo estis mencio en la pasinta informo. Plus ni sukcesis ligi kontakton en redakcio de distrikta gazeto *Náš život* (Nia vivo). Preskaŭ unufoje monate eblas aperiĝi en ĝi mallongan artikoleon, kiun preparas ing. Josef Vojáček. Kunvenoj de nia rondeto okazas jam regule escepte de ferioj merkrede 16.30-17.30 h. Malgraŭ tio komence de la jaro aliĝis al kurso por komencantoj 5 interesuloj, el kiuj restis tri. En la jaro 1989 ni planas internacian renkontigon de esperantistoj (22.-24.9.) kaj ni esperas, ke ĝi plialtigos prestiĝon de Esperanto en nia urbo kaj ke estos pli granda intereso pri la venonta kurso por komencantoj. (Ing.J.Vojáček)

Unua Centra Junulara Renkontigo de GDREA

Inter la 3-a kaj la 6-a de oktobro 1988 okazis en Biesenthal ĉe Bernau la 1-a Centra Junulara Renkontigo de GDREA, kiu organizis la Junulara Estraro kaj la Centra Estraro de GDREA kunlabore kun la Centra Konsilantaro de Libera Germana Junularo (LGJ, junulara organizo de GDR). Renkontigis ĉirkaŭ 180 gejunuloj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Pollando kaj Sovetunio. Dum la solena inaŭguro alparolis la gejunulojn reprezentantoj de la Centra Konsilantaro de LGJ, de Centra Estraro de GDREA, de la diversaj landaj Junularaj E-organizoj kaj de la Junulara Estraro de GDREA. Dum 4 tagoj okazis diversaj prelegoj kaj diskutoj pri ekz.: junularaj organizaĵoj kaj ilia hodiaŭa rolo por la Nova Pensado, la aktuala situacio en GDREA, TEJO kaj UEA en la hodiaŭa mondo, medioprotektado kaj E-movado, moderna E-instruado, instruado per komputiloj ktp. Tute ne eblas mencii ĉiujn temojn, kiujn oni ofertis. Memkompreneble ankaŭ restis tempo por amuzado, babilado kaj dancado. Oni preparis ankaŭ abundan programon por sportemuloj, inter alii: sak- kaj go-ludado, tablotenis, popgimnastikon, kuradon tra la arbaro kaj kelkaj eĉ uzis la eblecon nagi en la malvarma akvo de la proksima lago. Kaj eblis partopreni en ekskurso al la mondfama siplevatoro Niederfinow, kiu tre impresis la vizitantojn. Kulminoj de la amuza programo estis la internacia kultura vespero, la prezentado de komputila muziko kaj la "Dixiland"-muziko de "Jazkolegio Berlin". Dum la tuta aranĝo funkciis libro-servo kaj radioramatara stacio, kiu interligis la arangon kun la tuta mondo. Video-teamo dokumentis ĉiujn gravajn programerojn kaj du GDR-radiostacioj multfoje raportis pri la aranĝo. Entute ĝi estis tre sukcesa kaj altnivela aranĝo, kiu ofertis ion por ĉies gusto kaj vare estis kulmino de la laboro de la junaj geesperantistoj en GDR. Kaj jam nun oni pripensas post du jaroj denove organizi tian arangon. Certe ĉiuj partoprenintoj volonte revenos al Biesenthal. Jens Merker, Cottbus

Arta Semajno '88

En la semajno inter la 8-a kaj la 15-a de majo 1988 Distrikta Estraro Halle de GDREA okazigis internacian renkontigon por junaj artaj talentuloj esperantistaj. La 80 partoprenantoj venis el 6 socialismaj landoj (BG, CS, GDR, H, PL, SU). Krom internacia apertintersaĝo en la artaj genroj plastika kreado, figura arto, muziko, literaturo

kaj fotografado la celo estis la komuna kreado kaj ekzercado por la starigo de kom-
pletaj programoj.

La 13-an de majo vespere la partoprenantoj prezentis la rezultojn de sia komuna
laboro. Inter la kontribuoj kaj la prezentantoj precipe rimarkindaj estis:

- Pacprogramo de la junulara kulturgrupo de GDREA
- Internacia koruso (Ĝ. 30 partoprenantoj el 5 landoj)
- Latva ensemblo de popola muziko
- Muzika-klubareta programo de la E-grupo de gelnantoj el Wittenberg
- Solkantisto kun gitaro (Dirk Buchholz, Dresden)
- Kantgrupo "Verda Stelo" de la lernejo "N. Vapcarov", Sofio.

Menciindas i.a. jenaj verkoj kreitaj dum Arta Semajno '88 kaj ekspoziciitaj
samvespere:

- div. olepentraĵoj de Jiří Čelíkovský (profesia pentristo kaj skulptisto el Aš, CS)
- portretaj desegnaĵoj kaj litografio de Helga Plotner (amatora pentristino el Grä-
fenheinichen, gvidantino de la plastika laborgrupo)
- litografioj de Irena Jirásková (ceramika instruistino ĉe popolarta lernejo el Žac-
láš, CS)
- litografioj de Lina Sersicikaite (artstudentino el Varena, Litova SSR)
- litografio de Reni Donkova (amatora pentristino el Sofio, BG).

Al la programo apartenis ankaŭ distraj okupoj, eks. interkonatiga kaj adiaŭa
baloj, spektado de muzika teatraĵo en la Landa Teatro Halle, vesperoj kun konataj muzi-
kagrupoj, perautobusaj urborigardadoj, vizitoj en la fama Handel-Domo kaj tuttaga
ekskurso al Naumburg kun rigardado de la urbo kaj la katedralo kaj komuna migrado al
la fortikaĵo Schönburg, kie la ekskursanoj povis gustumi multajn specojn de kvalitaj
campanoj.

La sekvonta tiaspeca arango okazos antaŭvideble en 1990.

(Hans-Peter Bartos, Halle)



La du fotoj de H.-P. - Bartos montras la spektantojn kaj ekspozicion
de pentraĵoj, kiun vizitis d-ro Detlev Blanke kaj parolas al li Hans-Peter
Bartos.

AL PAROLA LERTO PER KOMUNIK-SITUACIA ALIRO

Kontribuaĵo al la 6-a IMS de Stefan MacGill, Budapeŝto. Aprilo 88.

Kial gravas paroli? En lingvo-instruado generale la emfazo transiris al la parolaj kaj komprenaj aspektoj; same okazis, ĉefe pro la influo de la Cseh-motodo, en Esperanto. Sed estas unikaj kialoj rilate al la situacio de iu ajn kreita internacia lingvo, kiuj igas la evoligon de la parolkapablo aparte grava. Ili estas resumeblaj jene:

- Esperanto estas malpli intense uzata ol preskaŭ ĉiuj etnolingvoj;
- La skriba-lega uzo de Eo superas la parolan-aŭskultan pli ol ĉe aliaj etnaj lingvoj;
- La proporcio de formala unu-direkta parola uzo superas la neformalan kaj ĉudirektan pli ol ĉe etnaj lingvoj;
- La gamoj de temoj kaj situacioj en kiuj oni uzas Eon estas pli limigitaj ol por ĉiutage uzataj etno-lingvoj;
- En etna lingvo la parol-kapablo de novaj komunumanoj formiĝas grandparte nature en familia rondo, por internacia lingvo, ni devas konscie kaj formale krei tiun kapablon.

Resume, kvankam Esperanto posedas unikajn avantaĝojn de simpleco kaj logikeco, ĝi laŭdifine kaj neevitebla havas samtempe gravajn kaj unikajn malfacilaĵojn, kiujn povas superi nur aparte lerta kaj efika instruistaro.

Paroli sencohave! Jam frue ni akceptis la valoron de parolaj kursoj, sed tio estas nur la unua ŝtupo sur la vojo. La vojo vere estas triŝtupa, kaj ankoraŭ restas en Esperanto plenumi la trian paŝon:

Gramatika aliro → temara aliro → situacia aliro
 /struktura/ /statika/ /dinamika/

Tio ne signifas, ke en la lastaj du aliroj, ni ignoras la gramatikon. Ĝi plue restas, sed ne nur ĝi plu regas la sinsekvon de la lernadoj kaj ne plu konsistigas la ĉefcelon de la lernado - ĝi estas rimedo, survoje al la ĉef-celo de lingva lernado - akiri la kapablon komuniki. Tiu komunikado devas esti realeca kaj sencohava. En la lecionoj ni uzu frazojn, kiuj estos poste praktike uzeblaj aŭ adapteblaj al utila uzo. En niaj nunaj Eo-kursoj tro abundas kaj superregas frazoj kiaj: "Rozo estas bela floro", "En la skatolo estas tri rugaj kraĵonoj kaj kateto kun bluj okuloj." En la temara aliro la lecionoj estas nomeblaj per substativoj: la domo, la familio, la metioj, la parko. En la situacia aliro, ili estas pli ofte nomeblaj per verboj: ili ekskursas, ili laboras, li petas informojn, li pardonpetas, si donas konsilojn. Ekzemple en la temara aliro, sub la rubriko "La domo" ni legas priskribon: "En la domo estas tri ĉambroj, en la salono oni sidas sur fotelo aŭ en brak-seĝo kaj rigardas televidilon."

Laŭ la situacia aliro, tio transformiĝas al pli viva agado, en kiuj personoj komunikas realisme, ekzemple, iu volas lui domon, kaj starigas demandojn al dom-peranto. Sama leksika enhavo, samaj gramatikajoj, sed jam ne plu temas pri iu verkisto de lernolibro, kiu ludas je Dio kaj preskribas statikan scenon, sed personoj komunikantaj sencohavajn informojn en realeca situacio. Ĉar temas pri roluloj, eta skeĉo, oni povas eĉ proponi amuzan aŭ surprizan finon al la dialogo, por kapti la atenton kaj intereson de la lernantoj. Por tiu grava celo, ne necesas ĉiam resti ĉe komplete realecaj situacioj - tiu aliro ne malpermesas la uzon de fantazio kaj kreivo, oni povas, aldone al la ĉiutagaj situacioj - petado pri voĵ-indikaj instrukcioj, aĉetado - prezenti tute fantaziajn situaciojn, konatajn al la lernantoj el televidaj programoj ks. - ekzemple simpla spion-rakonto, detektivrakonto, aŭ serĉo - el kiu la lernanto tamen povas proprigi frazformojn kaj esprimojn por la ĉiutaga vivo - eĉ se li ne estas James Bond, Hercule Poirot aŭ simila. Ni bezonas grandan varion de situacioj por uzi la lingvon kiel eble plej diverskampe.

Sed en la plej sukcesa komunik-situacia kurso tiujn temojn oni ne elektas hazarde. Ilia sukceso devenas de lerta kaj trafa kombino de allogaj temoj kaj ekzercoj, kun gramatika progreso. Klare, por difinitaj situaciaj bezonoj, oni bezonas aparte uzi iujn gramatikajn konstruojn. Necesas nur identigi kaj parigi la gramatikon kun la strukturo, kaj ordigi la sinsekvon de la enkonduko de la gramatikajoj kaj ilia reviziado. Jen kelkaj ekzemploj de situacioj ligitaj kun strukturoj:

<u>Situacio</u>	<u>Gramatikaĵo</u>	<u>Ekzemploj</u>
konsilado	kondicionalo	Vi devus manĝi malpli.
foto-albumo	ĵaroj, kapabloj	Kiam mi estis kvinjaraĝa mi povis paroli kaj naĝi, sed ne bicikli. Certe, probable, versajne, eble
supozado	adverboj de ofteco, versajno	Mi certas, ke ... Mi dubas, ke ...
la armeo	ordonoj, volo	Vi devas ... Li preferus ...
esploristo	kompleksaj tempoj	... li estos manĝinta la duonon de siaj provizoj ... li estos atinginta altecon de 3000 metroj.

La unuopa instruisto aŭ la verkanto de tiuspeca lernolibro povas decidi, kiugrade vidigi la gramatikaĵojn malantaŭ la temoj. Iuj komplete kasas la gramatikon, kaj ĉion faras nur per ekzemploj, iuj post la ĝuado de la vigla enhavo diras klare: "Bone, vi amuzigis, nun, la vera celo de nia leciono hodiaŭ estas ... la akuzativo ... aŭ io alia, kaj oni poste tion eksplacite studas.

La plimulto de la situaci-komunikaj lernolibroj estas unulingvaj, t.e. internaciaj. Ili kuraĝigas jam dekomence la ekzercadon kaj internigon de modelaj kaj tipaj frazoj en la cellingvo, kun neniu komparo kun alia nacia lingvo, por minimumigi interferojn. Sekve necesas multaj bildoj kaj listoj por doni la ideojn kaj situaciojn pri kiuj oni volas dialogi. Tiuj bildoj devas esti allogaj prezenti-taj, kaj kompreneble esti dinamika: ili rakontas iun okazadon, aŭ bildigas situacion en kiu oni povas formi tutan serion de similecaj frazoj, sed kun malsama enhavo. Alia starigilo de konversacia situacio estas tabelo aŭ listo. Tiuj ne estas pedagogiaj arteferitaj listoj, kiel en pli tradiciaj kursoj, sed praktikaj realaj

listoj: ekzemple formularo, mendilo, armea task-listaro, veter-mapo, tabelo de aŭtoŝoseaj distancoj, plano por ekspedicio, listo de bezonoj. En tiuj listoj, se aperas entute vortoj, ili estas per minimumo esprimitaj, ekzemple la armea taskaro:

Novrek, Rut	Falci herbon
Kazer, Nul	Farbi barilon
Nenifa, Ron	Purigi necesojn
Senes, Per	Polari auton de generalo

Tiujn minimumojn oni povas transformi al plenaj frazoj por ĉiu soldato sinsekve:

Serge Ento: Novrek! Kion vi faracas ĉi tie?
Novrek, Rut: Ho! Ha! Sergento! Mi ludacas kartojn, sinjoro!
Serge Ento: Kaj kion vi devus esti faranta?
Novrek, Rut: Mi ne scias, sinjoro Sergento.
Serge Ento: Vi devus esti falçanta la herbon. Ek, unu, du, unu, du ...!

Tio, kion ili ĉiuj estis faraçantaj estas donita per bildo. Per posta bildserio, ni vidas la soldatojn plenumantaj siajn devojn, sed ĉiuj revantaj pri io pli alloga. La sekva dialogado eblas por ĉiu kazo:

Instruisto: Kion nun faras Nenifa?
Lernanto: Li nun purigas la necesojn.
Instruisto: Ĉu li estas kontenta?
Lernanto: Ne, li estas malkontenta.
Instruisto: Kion li preferus fari?
Lernanto: Li preferus ludi futbalon.
Instruisto: Kaj kion vi preferus fari ol lerni ĉiutage?
Lernanto: Mi preferus viziti la maron kaj la plaĝon ...
/aŭ io simila/

Jen nur tre mallonga resumo de la prezento de kaj pledo por la komuniksituaĉia aliro farita dum la Metodika Seminario en Strážnice. Tiuj teknikoj portas bonajn rezultojn por naciuj lingvoj, ni revu pri la tago kiam aperos la unua vere internacia situaci-komunika kaj dinamika lernolibro en Esperanto.

Ĉu kun la samaj problemoj?

Multnombraj statistikoj atentigas pri maljuniĝo de la Esperanto-movado internaciakale. Pro tio la streboj de BEA direktiĝis ĉefe al junaj homoj. Inter la plej signifaj sukcesoj de BEA estas la kunlaboro kun Ministerio pri scienco, kulturo kaj klerigado. Al la jam aprobita fakultativa instruado de Esperanto en mezaj lernejoj kaj kiel deviga studobjekto en du sofiaj lernejoj, BEA povas aldoni kiel gravan atingon la aprobon de Esperanto-metodikistoj en la lando. Alia bona rezulto dum la pasinta periodo estas la akcepto de Esperanto kiel fako en la Supera Pedagogia Instituto en Blagoevgrad... Alia grava momento estas la perfektigo en la lingvoposedo. La taŭgeco de la vaste uzata trigrada sistemo de instruado jam delonge estas pruvita. La sekvaj du kursoj post la komenca estas malfacile organizeblaj, sed tre ege gravaj por la firmigo de E-movado. Lastatempe en Bulgario dum unu lernoĵaro estas acetataj inter 4000 kaj 6000 lernolibroj por komenca kurso, proksimume 300 lernolibroj por progresiga kurso kaj ĉirkaŭ 100 lernolibroj por la supera kurso. "Ni jam devas liberigi de la tiel nomataj eternaj komencaĵoj. Ili nek povas arguentite popularigi la lingvon, nek okupigi pri rezultodona organiza laboro, aŭ gvidi kursojn. Ili fakte eĉ malhelpas nian laboron, anstataŭ fari ion utilan"... oni aertas en Bulgara Esperantisto - septembro 1988.

KONVERSACIO POR PROGRESINTOJ



Deknaŭa temo : FILOZOFIO

/Josef Chvosta/

La funkcio de la cerbo ĉe homo estas tiom diferenca de la alia materio, ke la religio kredas pri aparta animo, kiu vivigas la materion. La materialismo ne konsentas, ĝi tamen parolas pri psiko, kiu kapablas pensi abstrakte. Prabhomo kaj superaj animaloj pensis nur konkrete, poste la homo trovis nociojn por konkretaj objektoj kaj ideojn pri tute abstraktaj pensoj. Tiujn nociojn kaj ideojn strebis la homo konigi al alia homo. Tial ĉe homoj multe evoluis parolado per vortoj, sed estas eĉ aliaj iloj de interkomprenigado. Nervoj signalas al la cerbo perceptojn el ekstero kaj interno de korpo kaj cirkaŭejo. En la cerbo ekestas impresoj, kiujn oni kompletigas al imagoj. Ili restadas en la memoro. Kelkaj imagoj estas nerealaj, eĉ se la cerbo opinias ilin faktaj. Tiu estas iluzio. Revo estas nereala imago, kiun oni sopiras realigi. Idealo estas imago pri perfekteco. Halucinoj estas perceptoj elvokitaj sen fakta perceptado. Tre intensaj halucinoj estas vizioj. Se oni profunde pensas, oni cerbumas kaj meditas. Ĝusta meditado estas rezonado, oni ekkonas konsekvencojn kaj faras bonajn konkludojn. Neprecize oni supozas, konjektas, iam nur divenas, en la scienco hipotezas. Opinio estas esprimado de propraj pensoj. Intenco estas koscia volo celanta ion. En mensogo oni intence ne diras veron kaj trompas. Per la pensado oni trovis motivojn al certa agado. Motivo ŝajna aŭ fikcia estas preteksto. Eraro estas malgusta pensado. Se la eraroj multigas, aperas konfuzo. Logiko estas sumo de reguloj pri gusta pensado.

Menso estas kapablo pensi kaj kompreni. Racio estas kapablo trovi plej bonan kaj plej taŭgan solvon. Intelektio estas mensogo, kiu pensas ĝuste kaj bone. Sento igas agi laŭ tujaj impresoj kaj emocioj. Okulfrapa sento estas afekto. Pasio estas sento tro forta kaj daŭra. Angoro estas sento, ke venos io malagrabla, eĉ se oni ne scias tion precize. Timo estas rekta scio pri preciza malagrableco. Ĝenon oni sentas, se oni estas en nenormalaj kondiĉoj. Honton sentas tiu, kiu agas kontraŭ ĝeneralaj principoj. Gojo estas sento de agrableco, kolero estas sento de malkontenteo. Miro estas sento pri io surpriza, stranga, neatendita, nenormala aŭ eksterordinara. Jaluzo estas pasio de timo pro ia perdo, aŭ tiu de simpatio aŭ tiu de posedado. Inklino estas emo al iu aŭ al io. Inklino al persono estas nomata ankaŭ simpatio. Nenormala inklino estas manio. Kompato estas kunsento kun fremda malfelico. Plezuro estas sento de bonstato kaj gojo post kontentigo de deziro aŭ inklino. Volupto estas sento de plezuro de sentumoj. Libido estas plezuro en seksa afero. Talento estas eminenta kapablo. Genio estas plej alta grado de homaj kapabloj. Koscio estas kono pri propraj sentoj kaj pensoj. Se oni perdas koscion, oni svenas. Koscienca estas prijuĝo kaj taksado de propra agado kaj kondutado.

Sprita homo pensas rapide kaj originale . Saga homo scias pri ĉio guste ĵugi kaj agas bone . Prudenta homo distingas la veron kaj ĵugas la aferojn tiaj , kiaj ili fakte estas . Inteligenta homo facile komprenas , pensas kaj agas vigle kaj lerte . Ingenia homo estas eltrovema . Sagaca homo scias pensi pri sia propra utilo . - Ruza homo elpensas intrigojn por gajni avantaĝojn por si . Hipokrita homo ŝajnis eĉojn , kiujn tiu ne havas . Stulta homo pensas malrapide kaj rezonas malbone . Naiva homo ne kaŝas siajn opiniojn . Mensmalforta homo estas daŭre stulta kaj naiva rilate al sia ago . Fervora homo strebas multe kaj agas vigle . Granda kaj nobla fervoro estas entuziasmo . Indiferenta homo agas malrapide kaj sen intereso . Freneza homo perdis la prudenton pro malsano aŭ sinregadon pro pasio . Psikiatrio estas scienco pri mensaj malsanoj kaj defektoj . Kelkaj malsanuloj suferas pro hemikranio , dum kiu forta doloras kapo , precipe certa duono . Fanatika homo estas bilnde fervora kaj senindulge ekscesanta . Embarasa homo ne scias kiel agi . Gentila homo estas afabla al ceteraj kaj ne strebas malutili ilin . La homan agadon direktas volo , deziro kaj sopiro , iam influas ĝin instigoj kaj stimuloj de aliaj homoj kaj propraj instinktoj . Surprizo povas alian homon eĉ konsterni . Ordo estas intenco , sed la plenumon faras iu alia . Kutimo estas agado ofte ripetata kaj praktikata senkonscie . Moro estas generala vivmaniero . Moralo estas sumo de reguloj pri kondukado de homoj . Altruismo estas amo kaj helpemo al ceteraj , egoismo estas memamo , kiu pensas nur pri propra utilo . Ne decas tio , kio ne konformas al generalaj reguloj , ekzemple - ne decas kraĉi ĉie saĵivojn . La kulpo estas agado kontraŭ reguloj , religioj nomas ĝin peko . Kulpon aŭ pekon oni pentofaras . Vengo estas ago kontraŭ iu , kiu faris maljustagon . Suspekto estas kredo pri kulpeco aŭ pri malbonaj intencoj . Ĉirkaŭaĵo povas vekti en malbona senoc abomenon , pli fortan naŭzen , ĝi povas tedi , lacigi , ĉagreni aŭ enuigi . Oni bedaŭras ion perditan aŭ nerealigeblan . Nekutimaj fenomenoj homojn ekscitas aŭ incitas al kolero aŭ timo . Oni indignas pro maljustaĵo aŭ malnoblaĵo .

Homoj havas bonajn aŭ malbonajn ecojn , sed tio iam dependas de grado . Homo kun plimulto da bonaj ecoj estas virta . Karaktero estas tuto de eĉoj . Humoro estas momenta stato de homa agado . Ofte ĝi speguligas en vizago , oni parolas pri mienoj de homoj . Mieno estas momenta stato de fizionomio . Kaprico estas tre rapida kaj subita ŝanĝo de humoroj . Temperamento estas rapideco , kiel homoj agas . Temperamentoj rapidaj estas sangvino kaj holeriko , malrapidaj estas flegmo kaj melankolio . Konsilo estas okaza helpo per konkludoj . Konsolo estas mildigo de ies ĉagreno aŭ doloro . Konvinko estas entrudo de propraj konkludoj al si aŭ al iu alia . Sukcesa konvinko estas persvado . Devo estas neceso de agado , rajto estas povo bazita sur lego aŭ moro , pretendo estas postulo kaj validigo de tiu rajto .

Oni klarigas la pensadon per kuniĝoj inter ĉeloj de la cerbo , kiu estas aŭ momentaj , tuĵaj aŭ daŭraj . Unuj ĉeloj estas ĵus streĉataj , dum aliaj estas en malintenso . Distro estas interrompado de intensa laboro de ĉeloj . Dormo estas ĝenerala malintenso de plimulto da ĉeloj . Sed per kelkaj ĥaosaj pensoj en subkonscio venas songoj . Kelkaj homoj eĉ dum dormo moviĝas kiel somnambuloj aŭ lunatikoj . Arte alvokita dormo venas pro hipnoto .

Religio estas populara filozofia sistemo , kiu ordonas adori supernaturajn estulojn per diversaj liturgioj . Sacerdotoj estas propagandistoj de religioj , iam nur ili povas plenumi literaturajn agojn . Superstiĉo estas kredo pri diversaj signoj , talismanoj kaj fetiĉoj . Generale oni kredas , ke krom materio ekzistas sendepende spirito . Drogoj estas materialoj ekstraktataj el plantaĵoj aŭ mineraloj , kiu influas la agadon de la cerbo . Scienco pri la spiritaj fenomenoj estas psikologio.

GRAMATIKO : 1 Strebu klarigi diferencon inter : bono - boneco , fervoro - fervoreco kaj simile . Trovu dek ekzemplojn kaj skribu po du frazoj al ĉiu ekzemplo . 2 Kia estas diferenco inter revo kaj songo ? 3 Skribu ekzemplojn de tielnomataj modaj verboj : mi devas , mi povas , mi rajtas ktp. Trovu plej taŭgajn ekzemplojn por bone diferencigi nuancojn inter signifoj

STILO : 1 Rakontu ian interesan songon el via dormo aŭ el literaturo 2 Skribu nelogikan rakonton kaj klarigu , kio estas ne- aŭ kontraŭlogika 3 Kion vi scias pri klarigado de songoj?

DEMANDOJ : 1 Homo alskribas ecojn al bestoj : ekzemple , ruza kiel vulpo . Nomu dek aliajn ekzemplojn , kion diras la zoologio pri tio ? 2 Kiujn homojn kun signifaj ecoj vi konas el literaturo ? 3 Kiujn ecojn havu via kunulo en geedziĝo ? 4 Kiujn religiojn vi konas ? 5 Kio estas miraklo ? Ĉu mirakloj ekzistas ? 6 Kiel rilatas la grandeco de cerbo kun inteligenteco ? 7 Kiujn drogojn vi uzas ? Kiel oni uzas drogojn ? Kiuj drogoj estas malpermesataj ? 8 Kiajn ecojn havas fripono , kanajlo , fihomo , vagabondo ?

Nova ĉeĥoslovaka E-prospekto

antaŭ nelonge venis el la presejo. Ĝia titolo estas "VRANOVSKO-ZNOJEMSKO" kaj aperigis ĝin la "Registara Komitato de Vojaĝtrafiko de Ĉeĥa Socialisma Respubliko" kaj la distrikta entrepreno "Rekreace Znojmo".

Tiun ĉi, 36-paĝan, kolore ilustritan prospekton eblas ricevi je la adreso: Okresní podnik rekreace Znojmo, CS-671 03 VRANOV nad Dyjí, Ĉeĥoslovakio. (Tel. 0624 97221, 97250.)

- vjh-



Renkontigo de esperantistoj-invalidoj en Slaný

De la 19-a ĝis la 22-a de septembro okazis en Slaný renkontigo de esperantistoj-invalidoj, komencantoj. La renkontigon **organize** certigis kaj aranĝis baza organizo = Paco kaj amikeco = Slaný.

Alveturis partoprenintoj de ĉiuj anguloj de nia patrujo /de la plej okcidenta angulo ĝis la orienta Slovakio/. Krom organizintoj kaj gastoj ĉeestis dudek partoprenintoj.

Kia agrabla surprizo kiam ĉe haltejo de aŭtobuso en Slaný atendis nin la organizintoj. Ili helpis al ni forveturigi niajn valizojn al hotelo Grand, kie ni ĉiuj logis.

Posttagmeze ni ĉiuj kunvenis en salono kie okazis solena malfermo de la renkontigo. La renkontigo okazis sub patroneco de distrikta komitato de Asocio de invalidoj. Gastoj de la renkontigo estis prezidanto de la distrikta Asocio de invalidoj s-ro Pinkner, prezidanto de la urba porpaca movado kaj membro de la prezidantaro de Urba Nacia fronto d-ro V.Jiráť, prezidanto de la E-rondeto en Kladno kaj membro de porpaca sekcio de ĈES s-ano J.Slavík kaj s-ano ing. J.Krob kiu reprezentis CK-on de ĈEA, s-ino Olga Nováková, prezidantino de la sekcio de E-invalidoj.

Ni ĉiuj prezentis nin kaj la programo komenciĝis. Ni sidiĝis kune ĉirkaŭ granda tablo, do la interrilatoj estis tre ~~senperaj~~ kaj traktado trapasis en agrabla atmosfero. Temoj pri ĉiuj parolis gastigintoj kaj gastoj: Esperanto hieraŭ kaj hodiaŭ, Perspektivoj de Esperanto, Kion donos al vi Esperanto. Vespere jam neniu programo sekvis por ke ni havu ankaŭ la tempon por ripozo.

La duan tagon antaŭtagmeze okazis instruado de Esperanto. **Praktika** lernado de Esperanto estis precipe dediĉita al problemoj kaj malfacilaĵoj, ĉiuj povas ekesti dum la studado. Ni ankaŭ havis eblon praktike pruvi niajn konojn.

Posttagmeze ni ekskursis al Lázně Mšené, kie akompanis nin cefkuracisto d-ro V.Tutzký. Vespere ni ĉiuj bonvenigis s-inon J.Rýznarová el Pardubice, kiu alveturis projekcii **diapozitivojn** el Francio kaj **Roterdamo**. La projekciadon si akompanis per vortoj. Ŝia prezentigo tre plaĉis al ĉiuj.

La trian tagon antaŭtagmeze denove ni lernis Esperanton. Krom eksplikado de pli malfacilaj partoj de E-gramatiko preparis la organizintoj aŭskultadon de sonregistraĵoj.

Posttagmeze okazis = posttagmezo de demandoj kaj respondoj = dediĉita al Esperanto. Vespere ni kantis diversajn kantojn, per harmoniko akompanis nin membro de BO de invalidoj en Slaný s-ro Tenopír. Ni ellernis ankaŭ unu Esperantan kanton.

La renkontigo finiĝis per komuna forveturo al Praha, kie ni trarigardis la Regan vojon, Malmovurban placon, zonon por piedirantoj kaj venis la neevitebla fino.

La renkontigo estis bone preparita, neniu el ni kritikis, eble nur tion, ke la renkontigo daŭris mallongan tempon kaj ankaŭ tion, ke ne estis eble rezervi logigon en hotelo kun lifto por ke povu

viziti la renkontiĝon ankaŭ rulseĝuloj. Ni ĉiuj devas kelkfoje dum la tago superi sesdek tri ŝtupojn. Venonta renkontiĝo okazos en Česká Třebová, do ĝis tiam = ĝ i s r e v i d o =.

Laŭ letero de J. Zigáčková, partoprenintino de la renkontiĝo.

Tradukis J. Malínská

La esperantistoj-invalidoj esprimis sian sinceran kunsenton kun la armena popolo, trafita de detrua tertremo, kaj organizis rapidan helpon sub devizo "HELPO AL ARME-NIO". Oni kolektis monon kaj dum Kristnasko 1988 transdonis ĝia al la sovetia ambasadorejo en Prago.

Renkontiĝo de esperantistoj-invalidoj

La 1-a Internacia Renkontiĝo de E-invalidoj okazos inter la 19-a kaj la 27-a de aŭgusto 1989 en urbo Česká Třebová, Ĉeĥoslovakio. La ĝenerala temo de la renkontiĝo estas = KION SIGNIFAS ESPERANTO POR INVALIDOJ = . La renkontiĝon aranĝas Sekcio de E-invalidoj de ĈEA. Informpetojn adresu: Sekcio de E-invalidoj, PK 63, 274 01 Slaný, Ĉeĥoslovakio.

La ĉi-jara SOMERA ESPERANTO-TENDARO en Lančov okazos en jenaj tri etapoj:

- 2. 7. - 15. 7. 1989
- 16. 7. - 29. 7. 1989
- 30. 7. - 12. 8. 1989.

Informojn kaj aligilojn sendas: Esperanto-klubo, CS-674 01 Třebíč, Ĉeĥoslovakio.

En "Esperantisto Slovaka" ni legis: La sekretario de SEA Ing. Milan Zvara ricevis de la Ministerio de Kulturo de SSR en Bratislava la honoran titolon "Modela laboranto en la kulturo". Ni gratulas!

Ĉu komo antaŭ "ke" estas nepre necesa?

La ĉefa funkcio de komo estas preventi miskomprenon. Laŭ meto aŭ nemeto de komo povas ŝanĝigi la senco de ec mallonga frazo:

1) Johano, purigu vian biciklon! 2) Johano purigu vian biciklon!

En 1) la parolanto ordonas al Johano purigi sian biciklon, en 2) la parolanto turnas sin ne al Johano, sed al alia persono (eble al la edzino) kaj sugestas, ke Johano purigu sian biciklon.

Se lingvo havas striktan vortordon, komoj estas malpli necesaj. Sed la vortordo de Esperanto estas pli libera ol tiu de la angla, germana aŭ slavaj lingvoj. El la 6-vorta frazo "Andreo certe hodiaŭ renkontos amikojn drinkeje" vi povas aranĝi (6!) 720 permutaĵojn. Ilia esenca signifo estas egala, sed laŭ la kunteksto, dezirataj nuancoj, rimo kaj ritmo, ĉiu el tiuj 720 variantoj povas esti iel preferinda al la ceteraj. Komparu la sencan diferencon - kun eksplika subpropozicio:

La junulino, kiu jam decidis forkuri de sia amato, ricevis leteron plenan de riproĉoj. La junulino, kiu jam decidis forkuri, de sia amato ricevis leteron plenan de riproĉoj.

Kaj jen kun propozicio restriktas:

Ludanto, kiu ĵetas 6 poentojn, dufoje sinsekve devas paŭzi.


Ludanto, kiu ĵetas 6 poentojn dufoje sinsekve, devas paŭzi.

Kiel vi vidas, la du ludreguloj multe malsamas pro la komo.

(Laŭ Wilhelm Schmid en la revuo Orienta 6/88)

ESPERANTAJ KOLEKTANTOJ ATENTU!!

Tutmondan adresaron por E-kolektantoj preparas Changsha-a Esperanta Filatelisto-Ligo. Se vi volas publikigi senpage vian adreson en tiu ĉi adresaro, bonvolu peti aligilon ĉe Miroslav Čegan, Vietnamská 1488, 708 00 Ostrava-Foruba. Bonvolu sendi poŝtmarkon por respondo. Dankon. La aligilojn vi devas sendi en Ĉinion antaŭ la 30. 5. 1989.



KORESPOND DEZIROJ ANONCOJ

17-jara studento de mezlernejo interesi-
gas pri komerco, ekonomio kaj lingvoj,
kolektas postmarkojn. Li volus korespon-
di tutmonde. Adreso: Miroslav Vopat,
Dřevec 10, 331 41 Kralovice, Ĉeĥoslovakio

51-jarulo loganta apud Krakovo interesiĝas
pri turismo, kolektas bildkartojn: Henryk
Kruczek, ul. 1 Maja 28a, PL 32-590 Libiąż,
Pollando.

15-jara lernanto, fraŭlo, volas korespondi
kaj interŝangi monerojn: Grzegorz Krawczyk,
ul. J. Słowackiego 9/26, 26-300 Opoczno,
Pollando.

27-jara polo interesiĝas pri turismo, mu-
ziko, joko, filozofio kaj sako, kolektas
postmarkojn, bildkartojn, librojn, sondis-
kojn: Adam Niedzien, str. Okrzei 24/4,
58-500 Jelenia Gora, Pollando.

21-jara knabo interesiĝas pri turismo kaj
Esperanto, kolektas postmarkojn kaj bild-
kartojn: Jacek Rybarczyk, ul. Towarowa 5,
PL-64-000 Koscian, woj. Leszczyńskie, Poll.

21-jara hemia laborantino interesiĝas pri
turismo, literaturo kaj folkloro: Joanna
Olżewska, 19-400 Olecko, str. Plac Wol-
ności 9/53a, Pollando.

40-jara ekonomikisto, direktoro de oficejo
volas korespondi kun ĉeĥoslovakaj esperan-
tistoj, li interesiĝas pri filatelo, muzi-
ko, sporto, filmo, historio, geografio,
politiko, religioj de landoj, ekonomiko.
Adreso: Andrzej Gielert, Olsztyn - 10 684
ul. Murzynowskiego 22/27, Pollando.

26-jara inĝenierino en politekniko en
Łódź volas korespondi: Elżbieta Pastwa,
ul. Kraczewicka 25/54, 24-320 Poniatowa,
woj. Lublin, Pollando.

17-jara lernanto de kvara klaso de liceo
interesiĝas pri turismo, biologio kaj nu-
mizmatiko: Dariusz Dąbrus, Borowina 56,
67-130 Siciebarzyce, Pollando.

20-jara lernanto interesiĝas pri muziko
kaj literaturo: Adam Szwiac, ul.
Świerczewskiego 22/B, PL-22-600 Tomaszów

Lubelski, woj. Zamojskie, Pollando.

28-jara virino interesiĝas pri filatelo,
aerobiko kaj turismo, kolektas postmar-
kojn kaj bildkartojn, fotografaĵojn de
famaj aktoroj kaj aktorinoj kaj kartojn
kun porokazaj stampoj, satas legi librojn
kaj romanojn kaj auskulti muzikon kaj
brodi kaj kroceti: Beata Prus, ul.
Starowiejska 10/12, 34-120 Andrychów,
Pollando.

Korespondi volas 40-jara instruistino:
Antonina Zawiśa, Łęcno 85, 97-333 Łęcno,
Pollando.

27-jara oficistino: Maria Matczak,
62-425 Witkowo, ul. Czerniejewska 16a/59,
Pollando.

25-jara oficistino, edzino, volus kores-
pondi kun rusoj, bulgaroj, francoj, ger-
manoj, italoj: Elżbieta Jędruchiewicz,
ul. Rolna 7/104, 40-954 Katowice, Poll.

21-jara teknikisto interesiĝas pri turis-
mo, sporto, literaturo, folkloro, kolek-
tas postmarkojn, bildkartojn, revuojn:
Maciej Łucka, str. Nowotki 23 13,
90 202 Łódź, Pollando.

24-jara fraŭlino, juvelistino, interesiĝas
pri arto, kulturo, malnova historio,
turismo, E-movado kaj ĉiuj tenoj. Adreso:
Eglė Žilinskaitė, Kaunas, Centrinis Paš-
tas 233 000-SU "Iki Pareikalavimo", Lito-
via respubliko.

30-jara komercisto, fraŭlo Volodimir
Hlusik, USSR-290022, Ukraino, Lvov, str.
Signivka 3-98, tutmonde, korespondaj te-
moj lauinterkonsente, responco certa.

21-jara fraŭlino interesiĝas pri litera-
turo, muziko, teatro, historio kaj E-mo-
vado, kolektas bildkartojn, librojn, su-
venirojn kaj esperantaĵojn. Adreso: Lenka
Šváčková, nám. Republiky 22, CS-301 12
Plzeň, Ĉeĥoslovakio.

Mi volas korespondi kaj interŝangi bild-
kartojn. Petr Knižák, nám. Pionýrů 315/1,
353 01 Mariánské Lázně.

Sukcesaj samideanoj-nagantoj

La 15-an kaj 16-an de oktobro 1988 okazis en Plzeň la kvina ĉampioneco de Ĉeĥoslovakio por nagantoj-veteranoj. En la aranĝo partoprenis ankaŭ du naĝantoj-samideanoj, ambaŭ en la aĝa kategorio 65-69 jaroj. S-ano Ing. Jaroslav Liška (Bohemians Praha) gajnis unu unuan lokon (50 m dorso), la duajn lokojn (50 m kaj 100 m brustnaĝo) kaj du triajn lokojn (200 m miksnago, 400 m libera maniero). S-ano Rudolf Balejčík (TTS Trenčín) estis la kvara en 400 m libera maniero.

En la aŭstra urbo Bregenz, la ĉefurbo de Vorarlberg, okazis la 5-an kaj 6-an de novembro 1988 la kvara internacia nagokonkuro por veteranoj. En la konkuro partoprenis 250 naĝantoj el 7 ŝtatoj. Unusola ĉeĥoslovaka reprezentanto Ing. Jaroslav Liška (Bohemians Praha) gajnis unu oran medalon (100 m miksnago) kaj kvar arĝentajn medalojn (50 m brustnago, 50 m rampnaĝo, 50 m papilio kaj 50 m dorso).

La XVI-a naĝveteraniado okazis en Brno-Lesná la 12-an de novembro 1988. En kadro de "Memorialo de J. Mikšovský" oni nagis kvarbatalon (brustnago, rampnago, papilio kaj dorso - ĉiam 50 m), 100 m miksnago kaj 400 m libera maniero. S-ano Ing. Jaroslav Liška (Bohemians Praha) startis en ĉiuj disciplinoj kaj sesfoje gajnis; s-ano Rudolf Balejčík (TTS Trenčín) startis en la konkuro de 400 m libera maniero kaj estis la dua.

LĀ/15.XI.88

Ĉu vi konas EŜLI?

EŜLI (Esperanta ŝak-ligo internacia) estas unu el organizaĵoj, kiu sukcesis kunigi la internacian lingvon kun praktiko. Ĝi kunigas ludantojn el la tuta mondo; ili ludas korespondajn turnirojn (Mondan pokalon, Teamturniron = ĉampionadon de naciaj teamoj, Paul-Keres-memorturniron, Zamenhof-memorturniron, ĉampionadojn de virinoj, de ĈSSR kaj aliajn turnirojn), praktikaj ludantoj ludas en olimpiadoj kaj ĉiuj ludantoj renkontigas en ŝakfestivaloj.

En Nederlando oni eldonas sakrevuon "Esperanta ŝako". Prezidanto de EŜLI estas D-ro Canibal el Karviná.

En turniroj oni renkontas ne nur rivalojn, sed amikojn kaj ĉiuj kune efektivas la sloganon de la Esperanta ŝaka movado: "Per Esperanto kaj ŝako por paco kaj amikeco inter nacioj".

Ĉu vi provas kun ni ŝakludi kaj uzi Esperanton? Prenu vian tabulon kaj vidu, kiel ludas EŜLI-anoj:

Bone atakis Helder VOSA (SU) kaj malbone defendis amiko Nobuo SAKURAI el Japanio (nigrulo): 1. d4 d5 2. c4 e6 3. Ĉc3 Ĉf6 4. Kg5 Ke7 5. e3 O-O 6. Te1 h6 7. Kh4 dxc4 8. Kxc4 a6 9. a4 Te8 10. Ĉf3 Ĉbd7 11. O-O Ĉf8 12. Ĉe5 Ĉbd7 ?? 13. Ĉxf7! Rxf7 14. Kxc6! Rxe6 (14. ... Rf8 15. Ka2 16. Db3) 15. Db3+ Rf5 16. Df7! Tf8 17. e4+ Rg4 18. Dg6+ Rxb4 19. g3+ Rh3 20. Ĉe2 Kd6 21. Rh1 Kxg3 22. Ĉgl mato. R.D.

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská str. 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Karel FRANC, Jiří HANOUSEK (grafika aranĝo), Ing. Vlastimil KOČVARA, Miroslav MALOVEC, Jiří PATERA (respondeca redaktoro) kaj Helena ŠTRUNCOVÁ. Presas OKP-6 LIBEREC. Transdonita el preŝejo 1988-12-30. Jarabono 36 ĈSK, por eksterlando 48 ĈSK aŭ 14 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turnu sin al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: K. Franc, J. Hanousek (grafická úprava), Ing. VI. Kočvara, M. Malovec, J. Patera (odpovědný redaktor) a H. Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 310008385 ze dne 18. 3. 1985. Tiskne OKP-6 Liberec. Předáno do tisku 30. 12. 1988. Dohledací pošta Praha 07. Sniženy poplatky za poštovné povolen Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

- 1/ Absolventi svazových zkoušek - pri scio: Zipseř
- pri kapablo instrui: Bilderová, Czafík, Chrdle, Jermář, Mendl,
Křesinová, Rajlich, Vesecká, Veselý, Vychodil
- 2/ Písemné kursy: 17 učitelů, 460 žáků
- 3/ Výuka v kroužcích: (z - začátečníci, p - pokročilí, d - děti)
Brno: 16z, 6p; Česká Třebová: 20z, 4p, 10d; Frýdek-Místek: 7z, 6p;
Jablonec: 29p; Karlovy Vary: 7z, 7p; Kladno: 35z, 6p, 20d; Lanškroun:
5d; Náchod: 14z, 1 kurs p, 2 kursy d; Olomouc: 16z, 7p, 8d; Opava:
5z, 8p; Pardubice: 1 kurs z, 1 kurs p, 2 kursy d; Praha: 60z, 40p;
Plzeň: 15z, 8p, 2d; Vítkovice: 11z; Vyškov: 5z; Znojmo: 1 kurs z,
2 kursy d; Havířov: 4z, 6p.
- 4/ Výuka na Lančově:
 1. etapa: vedoucí učitelů Otilie Barešová
kurs A1 - 11 dětí, A2 - 11 d, A3 - 15 d, A4 - 13 d, A5 - 11 d,
A-B - 10 žáků, B - 15 ž, C - 6 ž, Germana kurso - 6 d, Bulgara
kurso - 8 ž
 2. etapa: vedoucí učitelů - Otilie Barešová
A1 - 13 d, A2 - 13 d, A3 - 18 ž, A4 - 21 ž, B1 - 9 ž, B2 - 9 ž,
C - 7 ž, D - 4 ž, A5 - 4 žáci z NDR
 3. etapa: vedoucí učitelů - Růžena Vlková
A1 - 11 ž, A2 - 11 ž, A3 - 3 ž, A4 - 20 dívek, B - 17 ž, C - 7 ž,
D - 7 ž
- 5/ Členství v ILEI - 5 členů (výbor PS), odebíráme časopis Internacia
Pedagogia Revuo, 2 výtisky k dispozici v knihovně svazu
- 6/ 20.-24.4.1988 proběhl ve Strážnici mezinárodní metodologický seminář,
zpráva byla uveřejněna ve Startu
- 7/ Na konferenci 21.4.1988 byli do výboru ped. sekce zvoleni:
PhDr. Věra Barandovská, Volgogradská 41, 704 00 Ostrava 3 (předseda)
MUDr. Vladimír Škoda, Sovětská 919, 685 01 Bučovice
PhDr. Pavla Jodasová, V Štíhlách 1318/15, 142 00 Praha
Miroslav Malovec, Charkovská 7/10, 625 00 Brno
Helena Štruncová, Tádžická 4, 101 00 Praha 10
- 8/ Práce na pedagogických pomůčkách:
 - Učebnice SPN "Esperanto pro samouky" od V. Barandovské vyjde v ro-
ce 1989 v nákladu 20 000 výtisků, je v tisku po korektuře
 - Slovník SPN kapesní oboustranný - rukopis bude odevzdán v září 1989
 - Gramatiko de Esperanto (Malovec) vyšla v Třebíči, náklad 2000 kusů,
cena 17 Kčs
 - ve Startu vychází Konversacio por progresintoj de Josef Chvosta
 - Učební skripta pro místní kurs vyšla v Náchodě (Karel Strouha)
 - Učební texty, provizorní slovníky, četbu pro začátečníky vydává
Esperanto-klubo Liberec
- 9/ Na konec února 1989 je připraveno setkání žáků písemných kursů Jiho-
moravského kraje v Bučovicích.

Zapsali: 16.12.1988 v Brně

PhDr. V. Barandovská
M. Malovec

**Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979